



EL POPOLA CINIO

中國藝道
2 1984



Bronzaj Ĉevaloj kaj Ĉaro

(Bv. legi la artikolon "Bronzaj Ĉevaloj kaj Ĉaro Elterigitaj ĉe la Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio" en tiu ĉi numero)



de Qin-dinastio

Fotoj de MAO FU kaj WEI XIANG

Riparitaj bronzaĵoj kaj ĉaro







La Qinghai-Tibeta Fervoyojo

Fotoj de WANG JIANZHONG



Bronza koĉero
Foto de YANG YITONG






Diversnaciecaj pasaĝeroj ĝuas bongustajn manĝaĵojn en restoraci-vagono.

Trajno veturanta sur Tianjun-altebenaĵo alta pli ol 4 000 metrojn super la marnivelo



Bronzaj ĉevaloj



Interno de la ĉaro



Tibetanaj paŝtistoj
apud la fervojo



Altebenaj migraj bir-
doj super Qinghai-lago

La sala lago Qar-
han en ekspluatado.



Monata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Generala distribuanto:
Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio
(GUOJI SHUDIAN)
Esperanta Sekcio
P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Bronza ĉevalo elterigita ĉe la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio

Foto de MAO FU

SUR LA DORSKOVRILO:

Ujgura ŝafistino (Ĉin-stila pentraĵo)

de HUANG ZHOU

Tio ĉi estas nova verko de la fama ĉina pentristo Huang Zhou, kiu montras, kiel zorgeme la ĉina ujgura knabino flegas ŝafidojn.

KOLORAJ SERIOJ:

Bronzaj ĉevaloj kaj ĉaro de Qin-dinastio

La Qinghai-Tibeta Fervojo

Pejzaĝoj de Lushan-monto

Memorigaj poŝtmarkoj de la Ĉina Popola Respubliko pri ĝiaj flago, emblemo kaj himno

Sude kaj Norde de la Granda Muro (2): De Xifengkou-pasejo al la Orientaj Maŭzoleoj de Qing-dinastio

Norda Ĉinio en Vintro

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Gaja festo de taj-oj kaj ĝing-po-oj

Bredo de mustelo

Amatora ensemblo de kamparana familio

Konfitaĵo de Neijiang

Enhavo

Vizito al Mangshi	2
Vizito al Ĝingpo-a Montvilaĝo	5
Bronzaj ĉevaloj kaj ĉaro elterigitaj ĉe la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio	7
Sude kaj Norde de la Granda Muro (2): De Xifengkou-pasejo al la Orientaj Maŭzoleoj de Qing-dinastio	50
Kien interlingvistiko?	9
POR KOMENCANTOJ: Fervojo	13
ESP-NOVAĴOJ	12
Forpasis fama ĉina esperantisto Tikos	14
Fervojo sur monda tegmento	15
Malsanula lito en hejmo	17
Vintra vojaĝo al Heilongjiang-provinco	19
La ksilografiaj novjaraj bildoj de mia hejmloko	22
Fremdlandaj dramoj kaj operoj sur la ĉina scenejo	28
KURANTAJ AFEROJ	21
Metilernantino (Novelo)	35
POR VIA SANO: Saniga luktarta Ĉigong-o	40
VIDINDAJ LOKOJ: Pejzaĝo ĉirkaŭe de la monto Lushan	25
MIA VIVO: Mi dediĉis mian amon al infanoj	45
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Nacia flago de Ĉinio	27
5 000 JAROJ DE ĈINIO: Prospero kaj kadukiĝo de Tang-dinastio	48
ĈINLINGVA KURSO: Dua leciono	32
INTER NI	24
KORESPONDI DEZIRAS	11

JARABONTARIFO			FR Germanio	DM	14.00	Italio	Lit	6000.00	Portugaliao	Esc.	500.00
Aŭstralio	SA	7.00	Britio	£	4.00	Japanio	Yen	1400.00	Svisio	SF	12.00
Aŭstrio	Sch	100.00	Finnlando	FMK	30.00	Jugoslavio	Din.	200.00	Usono	US\$	6.00
Belgio	BF	230.00	Francio	FF	40.00	Nederlando	Gld.	16.00	Kanado	Can\$	7.50
			Hispanio	Pts	700.00	Nov-Zelando	NZ\$	8.00			
Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 4.00 US\$ 6.00			Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 2.80 US\$ 4.00								

VIZITO AL MANGSHI

POST kvartaga aŭta veturado en montaro, forlasinte Kunming, la ĉefurbon de Yunnan-provinco, mi atingis Mangshi, la ĉefurbon de la Dehong-a Taj- kaj Ĝingpo-nacieca Aŭtonoma Subprovinco.

Meze de septembro pasintjare, mi forlasis Pekinon, kie jam regis aŭtuna malvarmeto, kaj veturis al Dehong, kie la klimato estis tiel modera kiel en printempo kaj ĉie prosperis verdaĵoj. Dehong, ĉe la okcidenta montpiedo de Gaoligong, altas je 770 ĝis 1 040 metroj super la marnivelo. Ĝi havas ĉefe subtropikan arbaran klimaton, kaj

ankaŭ pseŭdotropikan, mezvarm-zonan kaj frost-zonan klimatojn, kun belaj pejzaĝoj, riĉa pluvokvanto, fekunda tero kaj abundaj produktaĵoj. Ĝi indas esti nomata trezorejo.

En tiu loko vivas krom hanoj ankaŭ tajoj, ĝingpooj, benglungoj, lisuoj kaj aĉangoj. Laŭ nacieca politiko, Dehong ĝuas regionan aŭtonomecon kiel aliaj regionoj dense loĝataj de naci-malplimulto. Mi venis al Dehong, ĝuste kiam ĝiaj loĝantoj festis la tridekjaran jubileon de la fondiĝo de la aŭtonoma subprovinco.

Promenejo en la urbo Mangshi



URBO DE AŬRORO

Mangshi taj-lingve signifas lokon, de kie leviĝas la suno. Tial oni kronas ĝin per la nomo "urbo de aŭroro". Sed antaŭ la Liberiĝo "aŭroro" estis nur espero de la popolo. Tiam la naci-minoritatoj vivis en mallumo. La regado kaj subpremo de tribestroj, montaj sinjoroj kaj reaktiva reĝimo dronigis ilin en profunda sufero. Ekzistis ankaŭ granda malpaco inter la naciecoj. Mangshi siatempe havis nur kadukajn domojn, mallarĝajn kaj malpurajn stratojn kaj malviglan komercon.

Sed hodiaŭ Mangshi aspektas tute alie: Sterniĝis antaŭ mi larĝaj kaj ebenaj asfaltitaj stratoj, ambaŭflanke de kiuj staras plur-etaĝaj konstruaĵoj kaj vendejoj kun riĉaj montrofenestroj. Aromis floroj en la surtrotuaraj bedoj kun feraj bariloj garnitaj per bildoj de paradanta pavo, dancanta gruo kaj pando brakumanta bambuon. Por festi la jubileon oni starigis laŭstrate provizorajn vendejojn plenajn de diversaj varoj. Sendube, la plej allogaj por mi estis ridoj kaj ĝojaj krioj de naci-minoritataj gejunuloj en festaj kostumoj. Ili spicis la "urbon de aŭroro" per densaj naciecaj koloroj kaj agrabla juneco.

ĜOJA FESTO

Frumatene de la festotago, kiam la suno ankoraŭ ne leviĝis ĉe la horizonto, de malproksime jam aŭdiĝis sonado de longaj tamburoj kaj gongoj, kiu urĝis min el la hotelo. Sekvante hom-torenton mi iris al la urba placo.

Ĉe unu flanko de la placo estis granda scenejo, super kiu pendis granda horizontala rubando kun kunven-titolo skribita en la ĝingpo-a, taj-a kaj han-a lingvoj. Sur la placo stariĝis draka kiosko de Taj-nacieco kaj kolora portalo de Ĝingpo-nacieco. La feste vestitaj oficistoj, popolanoj, mez- kaj elementlernejanoj de diversaj naciecoj torrentis al la placo de ĉiuj flankoj de la urbo. Ili kunfluis kaj aspektis kiel maro de homoj, flagoj kaj floroj.

Post la solena mitingo la ĉeestantoj ekdancis ĝoje, laŭtakte de longaj tamburoj, kaj tuj la placo turniĝis en maron de kantado, dancado kaj ĝojkrio. En tiu momento eĉ tiuj, kiuj neniam dancis, ne povis sin deteni de provo, inkluzive de gvidantoj kaj gastoj. La homoj kantis kaj dancis kaj la muzikiloj sonadis ĝis la profunda nokto.

SANA GENERACIO

En la stadiono de Mangshi junuloj de diversaj naciecoj prezentis tradiciajn sportojn, kiaj Kongĉjueĉjuan (senarmila luktarto imitanta pavan movon) kaj baston-lukto de Taj-nacieco, lukto per glavo kaj tiu per glavparo de Ĝingpo-nacieco, luktarto de Lisu-nacieco kaj tamburado de Aĉang-nacieco.

Rigardante tiujn viglajn junulojn, mi pretervole ekmemoris iun materialon kun priskribo de


Dehong antaŭ la Liberiĝo. Tiam en la loko cirkulis malaro, pesto, ĥolero kaj variolo, kiuj forrabis la vivon de sennombraj loĝantoj. Tie ekzistis neniu kuraca servo, por ne paroli pri disvolvo de sporto. Se oni malsaniĝis, oni sin turnis al budho por peti lian helpon. "Maturiĝas ora milio, tigre atakas malaro", "Patrino gravediĝis, sed bebo ne naskiĝis" — tiuj popolkantoj spegulis kiel grave la malsano plagis la tieajn naciminoritatojn.

Nun disvolviĝis la sanprotekta afero en tiu loko. Oni starigis kuracajn servojn ĉie en la subprovinco kaj la loĝantoj ne plu suferas tiujn malsanojn. La riĉa prezentado, kiun mi rigardis en la stadiono, montris la rimarkindan pliboniĝon de la sanstato de la loĝantoj, kaj tio estas ankaŭ miniaturo de la vaste disvolvita sporta aktivado de la popolamasoj.

DOLĈA LANDO

Mi vizitis sukerfabrikon ĵus konstruitan en la antaŭurbo de Mangshi. Ĉiutage ĝi premas 1 000 tunojn da sukerkanoj. Bedaŭrinde mi venis ne en sezono de sukerkana premado, mi do ne havis ŝancon vidi la viglan laboradon. Dank' al siaj naŭ sukerfabrikoj, kiuj produktis 70 000 tunojn da sukero en 1983, Dehong fariĝis la plej granda sukera bazo en Yunnan-provinco.

Antaŭ la Liberiĝo Mangshi havis nur kelkajn metiejojn por prilabori arĝentajn juvelojn kaj fari naciajn muzikilojn, kiaj longa tamburo kaj *sheng*-o. En afe-roplena sezono migraj metiistoj venis tien por ripari kaj fari simplajn agrikulturilojn. Nun Mangshi jam havas siajn industriojn elektran, karban, konstru-



Portalo en la urboplaco de Mangshi

materialan, maŝinan, tekstilan, manĝaĵan, plastan kaj ledan, kun la sukera kiel la ĉefa.

La disvolviĝo de la sukera industrio ankaŭ stimulis la kulturadon de sukerkanoj. Lastajn jarojn la popolanoj de Dehong energie disvolvis sukerkanan produktadon, utiligante favorajn naturdotitajn kondiĉojn. Rezulte de tio la sukerfabrikoj ricevis sufiĉan provizon de sukerkanoj kaj la kamparanoj enspezis pli multe.

Mi gastis ĉe taj-a vilaĝano Lao Han. Li diris al mi, ke ilia vilaĝo disvastigis kulturadon de sukerkanoj kaj la vilaĝanoj ricevis meznombro po 800 juanojn en 1982. Li malkonstruis sian malnovan bambuan domon kaj konstruis novan lignan kun lada tegmento per 6 000 juanoj. Li invitis min rigardi lian novan loĝejon. La domo aspektis kom-

forta, bela kaj fortika. Oni diris al mi, ke la enspezo de la vilaĝanoj pliiĝos en 1985. Multaj esprimis sian deziron sekvi la ekzemplon de Lao Han. Ili ridante diris al mi, ke kulturado de sukerkanoj estas ilia ŝatata afero.

PERLO ĈE LANDLIMO

La akvorezervejo Jiele, 3.5 kilometrojn longa kaj 750 metrojn larĝa (maksimume), kun kapacito de 25 000 000 kubmetroj da akvo, situas ĉe la landlimo inter Ĉinio kaj Birmo. Mi vizitis ĝin akompanate de laborantoj de la agrikultura oficejo de la subprovinco kaj la akvomastroma buroo de Ruili-gubernio. La akvorezervejo estas ne-granda, sed irigacias 1 400 hektarojn da kampoj, kio pliiĝis la kapablon de la regiono rezisti kontraŭ sekegeco kaj superakvo kaj akcelis la disvolviĝon de la agrikultura produktado.

En la pasinteco Dehong havis nur provizorajn bambuajn baraĵojn ĉe riverkurbiĝo kaj akvokondukajn kanaletojn. Nun en la tuta subprovinco jam konstruiĝis 69 mez- kaj malgrandaj akvorezervejoj, kiuj irigacias areon de 40 000 hektaroj, t.e. 73% de la totala areo de la rizkampoj.

Tiuj akvorezervejoj estas sin-teze utiligataj. Ekzemple, oni ne nur konstruis hidroelektrejon ĉe la akvorezervejo Jiele, sed ankaŭ bredas tie fiŝojn. Oni plantos arbojn ĉirkaŭ la akvorezervejo por fari ĝin turisma loko.

LANDO DE PAVOJ

En la subtropikaj arbaroj kaj sur ebenaĵoj de Dehong oni povas ofte vidi pavojn, tial oni nomas la lokon "lando de pavoj". Pavo estas rigardata kiel

simbolo de fortuno. Tie ĉiuj naciminoritatoj ŝatas ĝin. Eĉ literaturan revuon oni titolis "Pavo". Iu mia kunlernanto laboras en la redakcio de la literatura revuo "Pavo". Li donacis al mi poemaron "Pava Plumo", eldonitan de la loko.

Li diris al mi, ke nemalmultaj el la verkoj en la revuo kaj en la poemaro estas verkitaj de naciminoritataj literaturistoj kaj artistoj. Ili elspiras densan lokan moron kun nacia gusto. La subprovinca registaro donis grandan atenton al la uzo kaj popularigo de naciminoritataj lingvoj. La subprovinco eldonas du adekvatajn literaturajn revuojn en la taj-a kaj ĝingpo-a lingvoj.

Akompanate de mia kunlernanto mi vizitis ankaŭ la Unuan Elementan Lernejon kaj la Naciecan Mezlernejon de Mangshi. Li rakontis al mi, ke antaŭ la Liberiĝo Mangshi havis nur kelkajn elementajn lernejojn kaj lernejojn funkciigatajn de eksterlandaj misiuloj. Por kleriĝo naciminoritataj loĝantoj devis fariĝi bonzo kaj studi sutrojn. La granda parto de la popolanoj estis alfabetoj. Dum la longa pasinta tempo ili uzis plej primitivajn metodojn: Por ion memori ili faris noĉojn aŭ ŝnurnodojn, kaj por kalkuli ili nombris fabojn. La popola registaro donis grandan atenton al la disvolvo de la naciminoritataj regionoj, reformis la malnovan taj-an lingvon kaj publikigis projekton por plibonigi la skribosistemon de la ĝingpo-a lingvo. Tio multe pliiĝis la memfidon kaj memestimon de tiuj naciecoj kaj akcelis la progreson de ilia kulturo.

Nun la subprovinco jam komencis ĝeneraligi elementlernejan edukon. Ĉiuj gubernioj havas sian mezlernejon. Mangshi

havas mezgradajn fakajn lernejojn. Dank' al la disvolviĝo de la nacieca eduko aperis multaj kleraj kadroj naciminoritataj. Nun en la subprovinco laboras pli ol 5 000 naciminoritataj kadroj, kiuj okupas la ĉefajn postenojn en la gvidaj organoj de la subprovinca, gubernia kaj distrikta niveloj. La popolanoj de diversaj naciecoj havas plenan rajton por mastrumi siajn aferojn.

Mia kunlernanto estas Sichuan-ano. Same kiel multaj aliaj kadroj de han-nacieco li rigardas Dehong sia dua hejmloko kaj pretas dediĉi sian tutan talenton al la afero de la nacieca kulturo de Dehong.

Ne parolante pri ili, eĉ mi, alilokano, post kelktaga vizito estis neforgeseble impresita de la festa kunveno, la vilaĝo de tajoj kaj ĝingpooj, la bambua domo de benglungoj, la sukerkanaj kampoj, la kaŭĉuk-arbaro kaj la te-ĝardeno. Mi kore deziras prosperiĝon al la landlimaj regionoj de la patrujo kaj feliĉon al la diversaj naciminoritatoj.



Vizito al Ĝingpo-a Montvilaĝo

de LI QIANG

TRAPASINTE la akvobaraĵon de Lujiang-rivero nia aŭto daŭre kuris okcidenten laŭ la Yunnan-Birma Ŝoseo kaj post nelonge komencis montgrimpadon. En la Triterasa Monto loĝas ĉefe ĝingpooj kaj malmultnombro benglungoj (ambaŭ estas nacimalplimulto) kaj hanoj.

Starante sur la montsupro ni vidis ondantajn verdajn montojn unu super alia en malproksimo kaj vilaĝojn sube en oraj briloj. Ĉe iu vojkruciĝo nia aŭto sin direktis al mallarĝa tera vojeto ĉe kies ambaŭ flankoj staras altaj arboj, tra kiuj ne povas penetri la suno. La ĵusa pluvo kaŭzis al la vojo akvostagnon, kaj la aŭto ne povis daŭre veturi antaŭen, ni povis nur piediri laŭ pado en akompano de juna ĝingpoo.

Post vojturno ni atingis malgrandan ebenan herbejon, kie staris du fostoj kun horizontala trabo, kun simpla desegnaĵo. Nia akompananto diris al ni, ke tio estas la pordo de Bangwai-montvilaĝo, kiun ni vizitos. Trairinte la pordon, ni havis mallongan vojon kaj vidis la ĝingpoan vilaĝon inter verdaĵoj.

La vilaĝo havas malpli ol 20 familiojn. Same kiel en ĉiu alia ĝingpoa vilaĝo, ĝiaj membroj loĝas dise. Antaŭ la Liberiĝo la ĝingpooj loĝis en praarbaro kaj sin trovis en la periodo de mal-

komponiĝo de primitiva publika posedsistemo. Ilia produkta nivelo estis tiel malalta, ke ili kulturis migre kaj per primitivaj rimedoj, ekz. fosado kaj bruligado. Kien ili migris, tie ili plugis. Post la Liberiĝo, kvankam fundamente ŝanĝiĝis tia postĝinta produkta stato kaj konstruiĝis

loĝdomoj, tamen oni ankoraŭ konservas la historie formitan trajton, ke la ĝingpoaj montvilaĝoj estas malgrandaj kaj lokiĝas dise.

La loĝdomoj de ĝingpooj plejparte estas faritaj el bambuo kaj ligno kaj la tegmentoj el herboj. Ĉirkaŭe kreskas bambuoj, bana-

Ĝingpo-aj junulinoj



nujoj, artokarpoj kaj aliaj fruktoarboj. En la lastaj jaroj, pro la senĉesa leviĝo de la produkta nivelo, altiĝis jaron post jaro la ekonomia enspezo de ĝingpooj, el kiuj multaj riĉaj familioj jam konstruis novajn loĝdomojn kun tegolaj tegmentoj.

Tagmeze afabla mastro regalis nin per ĝingpoaj pladoj, kiuj profunde impresis nin.

Tie en la arbaroj viglas tigroj, leopardoj, aproj, pavoĵoj, buceroj kaj aliaj raraj birdoj. La grava ĉasaĵo estas ruĝa cervo. La mastro prezentis al ni sekigitan vianĉon de ruĝa cervo, kies gusto iom similas tiun de sekigita bovaĵo.

Kiam la gastiganto metis alian pladon sur la tablon, ni flaris agrablan odoron de porkaĵo kaj bambuo. La gastiganto konigis nin pri la kuirmetodo de tiu ĉi plado: Unue metu porkaĵon en junbambuan tubon, pistu ĝin en la tubo kaj poste miksu ĝin kun ĥakitaj kapsiko, cepo kaj zingibro. Stopu la aperturon de la bambutubo kaj baku ĝin sur fajro. Kiam la bambutubo krevas, la bongusta plado estas preta.

La alia malofta plado estas frititaj burdpupoj. Sur roko aŭ arbego oni povas trovi grandajn nestojn de burdoj. En la sezono de la burdoj ĉiu ĉelo de la nesto havas unu pupon. Guste tiam ĝingpooj senbrue deprenas abeluojn hejmen kaj elprenas el ili la pupojn por regali gastojn. La frititaj pupoj estas ne nur bongustaj kaj fragilaj, sed ankaŭ nutroriĉaj je proteino. Estas malfacile akiri tiajn abeluojn. Por tion akiri oni devas montri siajn grandajn kuraĝon kaj saĝon evitante atakon de la burdoj. Per tiu plado la mastro esprimis sian sincerecon al ni, gastoj el malproksima loko.

Dum manĝado ni trinkis aroman arakon faritan de la gastiganto mem. Arako estas tre grava por la ĝingpooj, same kiel greno kaj vesto. Tie ĉiu familio regalas gastojn per arako.

La vinujo uzata de ĝingpooj estas nek kruĉo nek botelo, sed bambutubo el du partoj, la supra servas kiel taso kaj la malsupra kiel kruĉo. Ĝi estas delikate ornamita per bambuaj pasamentoj. Tie la montoj abundas je bambuoj, tial ne mankas al ĝingpooj materialoj por fari vinujon.

Kiam la gastama mastro prezentis al mi "tason" da vino, mi volis danke rifuzi, ĉar mi ne drinkas, tamen mi ne permesis al mi tion fari, vidante liajn sincerecajn kaj instigajn rigardojn. Mi transprenis la "tason", diris kelkajn benajn vortojn al la mastro kaj eltrinkis la vinon. Tiam li tre ĝojis kaj eltrinkis plenan tubon da vino per unu spiro. La ĝingpoa proverbo diras: vino povas kunglui du montojn kaj kore ligas amikojn. La drinkado vere proksimigis nin, kaj ni multe plivigliĝis en babilo. Poste, la gastiganto donacis al ni la bambuajn vinujojn kiel memoraĵojn.

La ĉiutagaj vestoj de ĝingpooj estas tre ordinaraj. La viroj portas same kiel la hano kaj la virinoj longan ĵaketon kaj nigran cilindran jupon el memteksita kruda ŝtofo.

Por bonvenigi nin, la gastoj el Pekino, la ĝingpoaj gejunuloj de la vilaĝo surmetis festajn vestojn. La knabinoj portis striktan ĵaketon el nigra veluro kun arĝentaj ornamaĵoj sur la brusto kaj ruĝan bele desegnititan cilindran jupon el lano. Iu knabino diris al mi, ke tiuj arĝentaj ornamaĵoj signifas pavon, simbolantan feliĉon. Iuj knabinoj portas

altan ruĝan turbanon sur la kapo kaj aliaj havas frizitajn harojn pendantajn ĝis la ŝultroj. Ili ĉiuj aspektis viglaj kaj belaj.

La junuloj portas okulfrape blankan turbanon sur la kapo kun ruĝaj bulkvastoj. Krome, ili ĉiuj kunportas du rimarkindajn objektojn, nome sakon kun arĝentaj ornampecoj kaj longan tranĉilon ĉe la talio. La viroj kutime havas du longajn tranĉilojn, unu por laboro kaj la alia por festa ornamo. La tenilo kaj ingo estas tegitaj per arĝenta lameno kun belaj desegnoj. La tranĉilo reprezentas kuraĝon, neflekseblecon kaj virecon.

La ĝingpooj estas gaja nacio. Preskaŭ ĉiuj homoj ŝatas kanti kaj danci. Ili nepre okazigas balon en festaj tagoj por celebri triumfon, riĉan rikolton, geedziĝon ktp. Kiam ni eniris en la montvilaĝon, gejunuloj ĝoje ekdancis, ludante tamburon kaj gongon.

La knabinoj bele dancis kun tuketo streĉita de ambaŭ manoj, senĉese svingante la supran korpon kaj farante facilajn paŝojn antaŭen. La arĝentaj ornamaĵoj sur iliaj korpoj faris agrablajn sonojn je la interfrapiĝo. La junulo eliris sian longan tranĉilon, alte tenis ĝin antaŭ sia brusto, kaj tie ekdancis laŭ la muzika takto. Sub la suno brilis la tranĉiloj, kio manifestas, ke la ĝingpooj estas kuraĝaj kaj lertaj en batalo.

Sur la montsupro, en la densa arbaro kaj pitoreska montvilaĝo, ĉie mi sate aprecis la belecon de la naturo. Vivante kun la gajaj ĝingpoaj gejunuloj, mi plene ĝuis la profundan amikecon de la frataj naciecoj. Kortuŝite de tio ankaŭ mi partoprenis en la dancado.

Bronzaj ĉevaloj kaj ĉaro elterigitaj ĉe la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio

de MEIZHI

LA elterigo de la argilaj militistoj kaj ĉevaloj ĉe la maŭzoleo de la unua ĉina imperiestro en Lintong, Shaanxi-provinco, faris sensacion en la mondo, kaj oni rigardas ĝin kiel "la plej granda arkeologia trovo en la 20-a jarcento".

En 221 a.K. la Unua Imperiestro de Qin-dinastio aneksis la aliajn ses regnojn kaj starigis la unuan feŭdan ŝtaton kun centralizita povo. La militistaj kaj ĉevalaj figuroj plene montris lian majestatan ekspedicion por konkeri la ses regnojn. Tiuj figuroj dislokiĝis en tri grandaj kavoj, el kiuj la kavo n-ro 1 estas la plej granda. Plej antaŭe viciĝas 210-militista avangardo kaj ĝin sekvas 41 kolonoj de militistoj, militĉaroj kaj ĉevaloj, kaj ambaŭflanke kaj malantaŭe de la kolonoj staras po unu vico da militistoj. Estas tre mirinde, ke la vizaĝoj de tiuj 6 000-7 000 argilaj homfiguroj malsimilas unu al alia. Ili ja estas miraklaj kreaĵoj.

Post sia unuigo de Ĉinio la Unua Imperiestro de Qin-dinastio kvinfoje inspektis la landon. Por montri sian potencon, li ĉiufoje havis grandan gvardion. Oni diras, ke lian pompan ĉaron akompanis 81 ĉaroj. Dum sia triafoja inspektado la imperiestro trafis embuskon en Henan:

60-kilogramo ferbulo-paro kun pintilo falis sur akompanan ĉaron. Kaj la imperiestro restis senvunda. Ĉar la gvardio estis grandega kaj la embuskantoj malfacile distingis lian ĉaron. Ĉinaj arkeologoj supozis, ke eble ekzistas subtera ĉararo ĉe la maŭzoleo kun tiom da argilaj militistoj.

Sekve ili komencis ĝeneralan esploron pri subteraj restaĵoj ĉe

la maŭzoleo. En 1978 ili trovis oran ĉevalornamaĵon el iu prospektora truo kaj per tio konfirmis sian supozon. La 5-an de nov. 1980 ili komencis prifosadon. Post 28 tagoj, kiam ili fosis ĝis 7-metra profundeco, ili vidis lignan ĉerkon, en kiu kuŝas du ĉaroj, ĉiu kun kvar ĉevaloj kaj unu koĉero duongrandaj kiel la veraj.

Prifosejo de la bronza ĉevalĉaro




La kavo, 20 metrojn okcidente de la maŭzoleo, estas parto de granda remizo por ĉevalĉaroj. Ĉe la elterigo la ĉerkoj disfalis pro putro kaj la bronzaĵoj kaj ĉevaloj disrompiĝis en pli ol 5 000 pecetojn. Post du kaj duona jaroj arkeologoj sukcese restaŭris la postan ĉaron en la ĉerko, kiun ili nomas ĉaro n-ro 2. La ĉaro kaj ĉevaloj sume longas 528.4 cm., altas 104.2 cm. kaj pezas 1.8 tunojn. Ili havas sur si 1 564 orajn kaj arĝentajn ornamaĵojn.

La ĉaro n-ro 2 havas du septitajn ĉambrojn, elipsan tegmenton kaj klapfenestron ĉe la antaŭa vando, ŝovfenestrojn ĉe la dekstra kaj maldekstra kaj pordon malantaŭe. Ĝia ĉefa ĉambro estas tiel granda, ke oni povas sidi aŭ kuŝi tie oportune. Tial oni donis al ĝi la nomon "komforta ĉaro".

Kvankam oni elterigis nemalmultajn ĉarojn kaj ĉevalojn en la pasinteco, tamen granda parto de ili estis ligna kaj jam tute putris la jungilaroj. Tial la jungmaniero de la antikva ĉina ĉaro restis enigmo. La jungilaro de la bronzaĵoj kaj ĉevaloj disrompiĝis, tamen pro ĝia bronzeco oni sukcesis restaŭri ĝin. Sendube ĝi estas tre valora por esplori la jungmanieron de Qin-dinastio.

La nomita ĉaro estas unutilmona kaj durada. Ĝin tiras du mezaj kaj du flankaj ĉevaloj. Oni ŝarĝis la mezajn, metante jugon sur ilian kolon. La kvar ĉevaloj havas sur sia kolo po unu kolrimenon kaj tirrimenon. Tio estis antikva jungmaniero, kiun ne konas nuntempo. Arkeologoj nomas ĝin "maniero de kola tirado".

La bronzaĵoj kaj ĉevaloj montras ankaŭ altan nivelon de metalurgio de Qin-dinastio. Per



Bronzaĵoj kaj ĉevaloj

diversaj rimedoj kiel muldo, veldo, inkrusto, ĉizo kaj poluro oni plastike faris la metalajn ĉaron kaj ĉevalojn imite laŭ la veraj kun bambua, ligna kaj leda uzaĵoj. La ornamaj kvastoj faritaj el bronzaĵoj donas efikon kiel lana aŭ lina kvasto.

La bronzaĵoj kaj ĉevaloj estas delikataj kaj versimilaj. La koĉero sidas sur siaj genuoj kun brakoj antaŭen etenditaj, manoj duonpugniĝintaj kaj dikfingroj vertikale staraj kaj iom klinaj. Inter la montra kaj meza fingroj estas interspaco por kondukiloj. Li, ridetanta kaj singardema, aspektas kiel sperta koĉero. La kvar ĉevaloj impresas kiel la vivaj, eĉ vidiĝas sulkoj sur ilia palata volbo.

La bronzaĵoj kaj ĉevaloj surhavas klarajn kaj simplajn nubajn kaj geometriajn desegnojn kun blanka fono. La graciaj koloroj kaj oraj kaj arĝentaj ornamaĵoj faris ilin pli pompaj kaj imponaj.

Arkeologoj opinias, ke ili estas unu el la cent plej raraj objektoj elterigitaj en la subtera palaco de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio kaj havas tre altan valoron sciencan, historian kaj artan. La 1-an de oktobro 1983 la ĉevaloj kaj ĉaro n-ro 2 komencis eksponi en la Muzeo de Argilaj Figuroj de Militistoj de Qin-dinastio. Ili allogas multajn enkaj eksterlandajn vizitantojn.

KIEN INTERLINGVISTIKO?

I. LA INTERNACIA LINGVO ESTAS ESPERANTO

Kiel ni scias, estis iam diversaj internaciaj lingvoj, sed escepte de Esperanto, preskaŭ ĉiuj mortis baldaŭ post sia naskiĝo. Antaŭ kelkaj jaroj Interlingua, kiun kreis d-ro Alexander Gode kune kun kelkaj lingvistoj invititaj de IALA (International Auxiliary Language Association) laŭ la naturalismaj principoj, ankoraŭ intencis konkuri kun Esperanto, sed fine preskaŭ silentiĝis, kiam la invititaj lingvistoj sinsekve forlasis la asocion pro malkontento kontraŭ la monopolo de d-ro Gode kaj rezulte d-ro Gode mem rezignis sian estrecon en 1982.

La praktikado dum preskaŭ cent jaroj plene pruvis la pravecon de la lingvistika teorio de L. L. Zamenhof. Nun sur la palestro de internaciaj lingvoj restas nur Esperanto, kiu, kiel vivipova lingvo, senĉese kreskas, kun ĉiam pli multaj adeptoj. Ni do povas senhezite aserti, ke nun la unika internacia lingvo estas Esperanto.

II. LA TASKO DE INTERLINGVISTIKO

Nun interlingvistiko estas esplorata kaj diskutata en diversaj landoj. Pro manko de praktike pruvita teorio diversaj opinioj ne povas veni al unuanima konkludo, kaj tio donas al la lingva hegemoniismo oportunun ekspanzion. Mi opinias, ke ni esperantistoj devas preni sur nin la taskon restarigi interlingvistikon surbaze de la teorio kaj sperto de Zamenhof kaj profundigi ĝian esploron per modernaj sciencaj rimedoj, por ke ĝi estu teorie pli konvinka kaj efike kontraŭstaru al la tiraneco de la lingva hegemoniismo.

La celo de interlingvistiko, laŭ iuj lingvistoj, estas krei perfektan internacian lingvon, sed ŝajnas al mi, ke tiu celo estas jam atingita de Esperanto, kaj ĝi jam elmontris fortan vivipovon. Ce-

tere, la sukceso de internacia lingvo ne nur dependas de ĝia perfekteco, sed ankaŭ de multaj aliaj faktoroj, kiel ekz., internacia situacio, psikologia stato kaj bezono de la socio, demokratia labormaniero en la movado ktp. Sen tiuj faktoroj oni ne povus prosperigi iun ajn internacian lingvon, eĉ se ĝi estus la plej perfekta. Nun Esperanto jam enradikiĝis en la socio. Ni devas persisteme daŭrigi la popularigon de tiu lingvo kaj intertempe ĝin pliperfektigi per la komuna laboro de la esperantistaro.

Iuj esperantistoj rigardas Esperantologion kiel branĉon de interlingvistiko. Pri tio mi ne kuraĝas konsenti kun ili, opiniante, ke interlingvistiko, kiu sisteme esploras la teorion pri internacia lingvo kaj la tendencon kaj formon de ties movado, kaj esperantologio, kiu ĉefe sin okupas pri la lingvistika studo de Esperanto, estas nedisigeble dependaj unu de la alia. Mi do proponas, ke oni kunfandu esperantologion en interlingvistikon kaj nomu Makrointerlingvistiko tiun parton, kiu esploras la teorion kaj movadon, kaj Mikrointerlingvistiko tiun parton, kiu esploras la strukturon kaj evoluon de la lingvo mem. Tiu divido estas konforma kaj al la bezono de la akademia esplorado kaj al tiu de la internacia socio. En la lingvistikaj rondoj, nur sociolingvistiko agnoskas interlingvistikon kiel unu el siaj branĉoj, dum esperantologio estas apenaŭ konata. Tial, estas preferinde meti nian esploron sub la titolon "interlingvistiko".

Kiel sinteza scienca branĉo, interlingvistiko devas laŭeble riĉigi kaj plenigi sian enhavon per la ĝisdataj esplorrezultoj de moderna lingvistiko, sociologio, filozofio, historio ktp., por kreski sane kaj firmigi sian pozicion sur la lingvistika tereno.

III. MAKROINTERLINGVISTIKO

1. Naskita en pola urbeto regata de la cara Rusujo, kie loĝis pluraj nacioj kun pluraj lingvoj, Zamenhof persone spertis la malfeliĉon kaŭzitan de la lingva kaj nacia diskriminacio, la malfeliĉon, kiu siatempe ankoraŭ ne vekis la atenton de la filologoj kaj sociologoj. Por ŝanĝi tiun socian staton li decidis krei internacian lingvon. Li ne speciale studis lingvistikon, kaj en liaj verkoj malofte estas lingvistikaj terminoj. Liaj verkoj estas simplaj, pensigaj kaj vivecaj kaj, kiel oni facile vidas je detala esplorado, traktas plurajn problemojn, kiujn la tiamaj filologoj ankoraŭ ne

atentis. Ekz., publikiginte nur 16-regulan gramatiketon, 600 vort-radikojn kaj nombron da modelaj frazoj, li kredis, ke lia lingvo povas kreski per la "natura evoluo". Li ne detale motivis sian kredon, sed laŭ la vidpunkto de moderna lingvistiko la "natura evoluo" estas tute ebla, ĉar en la kapo de ĉiu homo troviĝas meĥanismo por generi frazojn. Lingvistoj eĉ provis konfirmi siajn teoriojn per Esperanto siatempe, ekz., per ĝia analogia principo de vortfarado. En Esperanto oni povas analizi ĉiujn vortelementojn per analogio, ekz.,

patro : patrino = frato : x

x = fratino

studi : studo = helpi : x

x = helpo

sed tiu analogio ne tute taŭgas por naciaj lingvoj, ekz., por la angla,

to help : help = to obey : x

x ≠ obey, sed = obedience

Eĉ sen mencio pri pliaj ekzemploj oni jam povas diri, ke Zamenhof staras inter la sociolingvistikaj pioniroj kaj teorie kaj praktike.

La kaŭzo de lia sukceso en praktiko kuŝas en lia demokratia sinteno kaj lia senrezerva sindeviĝo al la kulturo de la homaro. Pri tio ne mankas konkretaj ekzemploj, sed ilin mi ne detale mencias ĉi tie.

Unuvorte, por riĉigi kaj kompletigi la interlingvistikan teorion ni devas konsciencie, objektivite kaj sisteme esplori la teorion kaj sperton de Zamenhof pri la internacia lingvo.

2. Ni devas doni pli grandan atenton al la demando kiamaniere popularigi Esperanton. Mi pensas, ke antaŭ ĉio la esperantistaro tra la mondo devas unuiĝi por rezolute batali kontraŭ la lingva hegemoniismo, kiu estas la plej granda obstaklo en la popularigo de Esperanto. Ni devas vidi, ke tiun popularigon, precipe en la kapitalismaj landoj, nun katenas: a) manko de politika subteno; b) financaj malfacilaĵoj; c) nesufiĉaj amplekseco kaj profundeco de la lingva aplikado; ĉ) la ekzistado de "breĉoj" de la Esperantujo.

En la kapitalismaj landoj estas malfacile entrepreni ion sen fortaj financoj. En la historio de nia lingvo, oni klare vidas ke nur sub la helpo de sia bopatro, Zamenhof publikigis sian Unuan Libron, tamen post tio financaj malfacilaĵoj daŭre minacis la Esperanto-movadon de tempo al tempo. Ni de-

vas uzi efikajn rimedojn por kolekti al ni financajn subtenojn en kaj ekster la kulturaj rondoj, kaj samtempe la politikajn. Estas aparte necese por ni gajni la subtenon de la vasta publiko.

Por plivastigi la lingvan aplikadon ni devas funkciigi ne nur kursojn pri la fundamentaj scioj de Esperanto, sed ankaŭ kursojn pri sociaj sciencoj, naturaj sciencoj kaj industriaj teknikoj, eĉ korespondajn universitatojn, por ke oni havu okazajn lerni fakajn sciojn per Esperanto. Precipe, ni devas uzi pli grandan forton por traduki aŭ verki Esperantaĵojn pri ĝisdataj atingoj de la modernaj sciencoj kaj teknikoj. Nun en Hungario stariĝis la Scienca Eldona Centro de NEA. Laŭ mia opinio ni devas plifortigi tiun laboron kaj pligrandigi la vicaron de esperantistoj-sciencistoj.

Hodiaŭ la Esperanto-movado pleje viglas en Okcidenta Eŭropo kaj Japanio, kaj iom malpli en Norda, Centra kaj Suda Ameriko. En la lastaj jaroj la movado revigliĝas kaj aktive disvolviĝas en Ĉinio. Ankaŭ Irano aktive popularigas Esperanton. En Hindio troviĝas sporadaj esperantistoj, sed ankoraŭ ne formiĝis sufiĉe granda forto por puŝi la movadon antaŭen. En aliaj aziaj landoj, kvankam ankaŭ tie aktivas kelkaj esperantistoj, ankoraŭ troviĝas "breĉoj" de nia populariga laboro, kiujn ni devas ŝtopi. Aparte atentinda estas la stato en Afriko, kiu plejparte restas ekster nia Esperantujo. Ŝajnas al mi, ke UEA jam rimarkis tion, sed ankoraŭ ne donis sufiĉe grandan forton por ŝanĝi tiun staton. Mi do proponas, ke UEA kolektu nombron da spertaj esperantistoj el la okcident-eŭropaj landoj kaj Japanio kaj ilin sendu al tiu kontinento por popularigi nian lingvon.

3. Sendube, ni funkciigis kaj funkciigas nemalmulte da fruktodona Esperantaj kursoj, kunsidoj, someraj semajnoj ktp, sed por plibonigi nian laboron ni devas resumi nian sperton post ĉiu aranĝo kaj konstati, kian efikon ĝi havis kaj kiajn problemojn ĝi solvis aŭ ne solvis. Konsiderinda estas ankaŭ la problemoj kiel organizi la enlandan Esperanto-movadon. Ĉu lasi ĝin kreski tute spontanee kaj laŭkaprice, aŭ meti la diverslokaĵajn agadojn sub unuecan gvidadon? Persone mi preferas la lastan manieron.

4. Ni devas atente esplori la lingvan aspekton de la internaciaj kulturaj interŝanĝoj kaj la lingvajn politikojn de diversaj landoj kaj internaciaj organizoj.

IV. MIKROINTERLINGVISTIKO

1. La esperantistaro jam multe kaj detale esploris la fonetikon, gramatikon kaj vortaron de Esperanto, sed ilian esploradon iom katenis strukturismo. Estas ĝojinde, ke en la lastaj jaroj iuj esperantistoj komencis rompi tiun katenon, utiligante novajn atingojn de la lingvistika esplorado, ekz., John Wells, la aŭtoro de "Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto", kaj aliaj, kiuj esploras Esperanton laŭ la vidpunkto de moderna lingvistiko.

2. Kompare esplorinte la gramatikojn de diversaj naciaj lingvoj, Zamenhof difinis por Esperanto la nemalhaveblan 16-regulan gramatikon, kaj samtempe elektis por ĝia vortaro internacie uzatan kaj logikan parton de la vortoj de hindeŭropaj lingvoj. Kiel ĝenerale uzata lingvo de ĉiuj nacioj, Esperanto, mi pensas, devas ensorbi ankaŭ vortojn kaj esprim-manierojn el la lingvoj de aziaj kaj afrikaj nacioj, kun la sola kondiĉo, ke tiuj vortoj kaj esprim-manieroj estu facile kompreneblaj por plejparto de la nacioj.

La 16-regula gramatiko estas netuŝebla konsistenco de Esperanto. Kompreneble, la lingvo kreskas kaj kreskos, kaj post kelkcent jaroj tiu gramatiketo eble ŝanĝiĝos. La eventualaj ŝanĝoj


devas esti faritaj nur sub la konsento de la pliparto de la esperantistaro. La leĝo de la lingva evoluo diras al ni, ke la vortaro de lingvo ŝanĝiĝas multe pli rapide ol la gramatiko, sed kia ajn ŝanĝo okazu, ni devas protekti la purecon de Esperanto kontraŭ la lingva hegemoniismo.

3. Nun urĝe bezonata estas kontrastiva analizo inter naciaj lingvoj kaj Esperanto, kiu multe helpos nin en nia lingva instruado kaj tradukado, vidigante al ni la komunajn kaj malsamajn punktojn inter tiuj lingvoj, kaj cetere montros al ni la mankojn en la gramatika esplorado de nia gepatra lingvo.

4. Pli detala kaj profunda esplorado pri la instru-metodoj de Esperanto estas tre grava por la popularigo de nia lingvo, ĉar tiuj metodoj rekte influas la instru-efikon, kiu povus konvinki la publikon pri la facila lernebleco de nia lingvo.

5. La diakrona studo pri Esperanto povas helpi al ni observi la ŝanĝojn de ĝiaj fonetiko, vortaro, sintakso kaj literaturaj stiloj kaj sekve koni ĝian evoluon leĝon. Gaston Waringhien kaj aliaj lingvistoj-esperantistoj multe kontribuis tiuflanke, kaj ni devas daŭrigi ilian studon.

Karaj legantoj, mi sincere atendas viajn opiniojn pri tio, kion mi prezentis en tiu ĉi artikolo.



Tarifo: 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* S-ino Ida Baj (28-j. instruistino de la angla lingvo), dez. kor. kun samideanoj tutmondaj pri ĉiuj temoj. 58-500 Jelenia Gova, Sklodowskiej 3/9, Pollando.

* 14-jara knabino deziras korespondi tutmonde, aparte kun latinamerikaj geknaboj. Kol. poŝtmarkojn, bildkartojn pri fremdaj landoj, pri bestoj. Interesiĝas pri filmoj kaj aktoroj. Katrin Blanke, DDR-1054, Berlin, Rosenthaler Str. 2.

* 14-jara lernanto deziras korespondi tutmonde kolektas ĉion pri faŭno kaj flaŭro, poŝtmarkoj, bildkartoj, diapozitivoj, albumoj ktp. Adreso: Krzysztof Piotrowski, PL 51-122 Wrocław, ul. R. Kocha 1 A, Pollando.

* F-ino 25-jara deziras korespondi pri poezio, popolarto, slojdo, ĝardenlaboro. Adreso: Malgorzata Popialkiewicz, PL 61-846 Poznan, ul. Strzelecka 17 m. 19, Pollando.

* Mi deziras korespondi kun esp-istoj tm. pri sporto kaj muziko. Dariuŝ Kurek, ul. Wielka Skotnika 24/31, ul-400 Myslowice, Pollando.

* S-ino Lenke Szasz (36-j. instruistino), volas korespondi kun ĉinaj e-istoj. 4174 Praid n-ro 130, Fud. Harghita. R.S. Romania.

* 20-j. studento pri elektroniko, Birgit Becker, 3603 Dingelstedt, Bahnhofstrasse 233a, DDR, volas korespondi kun amikoj el Ĉinio kaj alilandoj, interesiĝas pri muziko kaj arto.

* Esperanto-Grupo Ismael Gomes Braga, Rua Silva Cardoso, 673-Bangu-21810, Rio de Janeiro-RJ-Brazilo, deziras korespondi tutmonde praktikante la lingvon.

TRI NOVAJ ESPERANTAJ LIBROJ ELDONITAJ

Post eldono de "Vivo de Zamenhof" en la ĉina lingvo, la eldonejo "Scio" en Pekino eldonis aliajn tri Esperantajn librojn kompilitajn de Li Weilun. Unu el ili estas "100 Humorajoj" konvena por komencantoj, en kiu troviĝas humoraj fabloj kaj anekdotoj kolektitaj el Esperantaj libroj kaj gazetoj de diversaj landoj. La aliaj du estas "Elementa Esperanto-kurso" (1) kaj (2). La lernolibro atentigas ne nur instruadon de fundamenta sintakso, sed ankaŭ Esperanta konversacio. Dum klarigado de gramatiko, la libro komenciĝas de la facilaj, kaj samtempe konsideras gramatikan sistemecon. Krome ĝiaj tekstoj estas interesaj. Tial ĝi estas unu el la bonaj lernolibroj eldonitaj en la lastaj jaroj en Ĉinio.

SIMPOZIO DE HUNAN-A ESPERANTO-ASOCIO

De la 19-a ĝis la 21-a de novembro, 1985 la Hunan-a Esperanto-Asocio okazigis en urbo Changsha Esperantan simpozion. Ĝin ĉeestis pli ol 70 reprezentantoj el la provinco kaj kvin esperantistoj el Pekino kaj la provincoj Yunnan kaj Anhui. La kunveno ricevis 7 disertaĵojn, kiuj tuŝis la problemojn pri fonetiko, historio kaj movado de Esperanto. Dum la kunveno la Esperanto-Asocio de Hunan kaj la Centro de Eksteraj Interŝanĝoj pri Scienco kaj Tekniko de Hunan kune organizis raportkunvenon pri Esperanto, en kiu Yang Kaiyuan, vicprezidanto de la Hunan-a Esperanto-Asocio, prelegis pri la rolo de Esperanto en la internacia scienca-teknika in-

terŝanĝo kaj ricevis grandan aplaudon de la pli ol 300 ĉeestantoj.

ESPERANTA INSTRUA SEKCIO EN LA ŜANHAJA FREMDLINGVA INSTITUTO

Por plifortigi la instruadon de Esperanto, la Ŝanhaja Fremdlingva Instituto fondis en 1985 Esperantan instruan sekcion, kiu instruas Esperanton al 4 klasoj kaj samtempe al tri Esperantaj kursoj de la vespera universitato de la Instituto. La instrua sekcio kompilis "Gramatikon de Esperanto" kaj "500 frazojn de Esperanto" kun sonbendoj, kiuj estis jam eldonitaj kaj distribuitaj en Ĉinio.

ESP-ORGANIZOJ NOVE STARIGITAJ

La Esperanta Esplorgrupo de Henan-provinco fondiĝis en oktobro, 1985, kaj estis akceptita de la Henan-a Lingva Asocio kiel ĝia membro. Ĝia tasko estas propagandi kaj disvastigi Esperanton en la provinco kun pli ol 50 milionoj da loĝantoj kaj fondi Esperanto-asociacion de la provinco.

La Changchun-a Esperanto-Asocio de Jilin-provinco fondiĝis en la 20-a de novembro, 1985. Cai Weiwu, vicestro de la urbo, kaj Zhang Yixia, estro de la Changchun-a Geologia Instituto, estis elektitaj kiel la honoraj prezidantoj de la asocio. Liu Yunzhao, vicestro de la provinco, Tang Aoping, estro de la Jilin-a Universitato kaj ĉina fama kemiisto, kaj Yang Di, vicestro de la urbo, fariĝis estroj de la Subtena Komitato de Esperanto.

Ankaŭ la Esperanto-Asocio de Jilin, la dua urbo de Jilin-provinco,

fondiĝis en oktobro de la sama jaro.

SENPAGAJ MATERIALOJ PRI KOMUNIKADO

1985 estis la "Monda Komunikajaro". Ĝi estis samtempe la unua jaro de la kvin-jara laboro por testado de la jubileo de Esperanto. La ligiteco inter la internacia lingvo kaj komunikado estis reliefigita de la ĝenerala sekretario de la Internacia Telekomunika Unio, R. E. Butler, okaze de la inaŭguro de la Universala Kongreso en 1985. Pluraj landaj asocioj kaj lokaj grupoj jam aranĝis kunvenojn por esperantistoj kaj ne-esperantistoj pri komunikado kaj Esperanto.

UEA disponigas al vi senpage fotokopiojn de ĉiuj artikoloj pri ĉi tiu temo, aperintaj en la esperantlingva gazetararo.

Kontaktu: UEA/Jubilea Jaro, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgujo.

INTERNACIA LERNEJA SEMAJNO

La kontribuo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj al la Jubilea Jaro estos la prezentado de Internacia Lerneja Semajno (ILS) aŭ aŭtune 1986 aŭ printempe 1987. ILEI intencas pruvi, ke per Esperanto eblas aranĝi senprecedencan lernejan instruadon al infanoj kaj pli aĝaj gelernantoj venontaj el kvin kontinentoj kaj krei inter ili tiun eksterordinaran etoson kiun nur ebligas la travivo de komuna lingvo.

Partoprenantaj estas junaj homoj kiuj atingos en 1986/1987 la aĝon inter 10 kaj 15 jaroj. La nombro de ILS estas limigita al 80 ĝis 90 lernejanaroj. Geinstruistoj el ĉiuj kontinentoj kaj landoj, kiuj ekde nun deziras kunlabori, estas bonvenaj. Por aliĝo skribu al

IV-A RENKONTIĜO DE SLAVONIAJ ESPERANTISTOJ

Komence de oktobro 1983 okazis la IV-a Renkontiĝo de Slavoniaj Esperantistoj en historie fama urbeto Vukovar. En ĝi partoprenis 136 esperantistoj el la tuta Jugoslavio kaj kelkaj gastoj el Hungario. La renkontiĝo temas pri komunikado inter popoloj en la nuna mondo kaj ĉefaj celoj kaj planoj de UEA, kaj oni ankaŭ prifestis la 10-jaran jubileon de Jugoslavia Esperanto-Revuo "Voĉo".

FONDITA POKALO "GJIVOJE"

Familio de elstara kaj konata

Dum solena inaŭguro de la IV-a Renkontiĝo de Slavoniaj kaj Baraniaj Esperantistoj



jugoslavia esperantisto kaj publicisto forpasinta antaŭ unu jaro Marinko Gjivoje fondis pokalon "Gjivoje" por "Vivo-Verko" kiu ĉiu-jare estos transdonata al plej elstaraj esperantistoj kiuj en la lastaj jaroj grave kontribuas al E-movado.

Ĉi-jare, la pokalon por "Vivo-Verko" ricevis la unua s-ro Dušan Adnadj konata en Jugoslavio kaj en la mondo kiel redaktoro de Jugoslavia Esperanto-Revuo "Voĉo" pro sia 25-jara E-agado kaj 10-jara eldonado kaj redaktado de "Voĉo".

Por Komencantoj

FERVOJO

KIAM mi estis malgranda infano, mi kaj miaj gepatroj loĝis en la kamparo kaj apud nia vilaĝo estis fervojo. En vintro, en pluraj tagoj post neĝado, la tuta mondo kovriĝis per blankaĵoj. Ĉio sur la tero donis nur blankan konturon¹ en la griza ĉielo, kaj nur la fervojo restis klare distingbla, rigardate ĉu de proksime ĉu de malproksime. De tempo al tempo vagonaroj venis kaj forkuris.

De mia knabeco mi ekamis la fervojon kaj ofte min distris ĉe

ĝi, kaj se trajno preterpasis, mi ĉiam gapis² al ĝi ĝis ĝi malaperis en la foraĵo. Kelkaj en mia vilaĝo estis aparte respektataj pro ke ili iam vojaĝis centojn aŭ eĉ milojn da kilometroj per vagonaro. Kiam ili revenis, ĉiuj ŝatis informi ĝi de ili pri la mistera mondo ekster la vilaĝo.

Post jaroj, ankaŭ mi havis la feliĉon vojaĝi per vagonaro kaj eĉ plurfoje. Nun mi loĝas en urbo. Feliĉe, ankaŭ nemalproksime de mia domo estas fervojo. Mi tre ŝatas promenadi apud ĝi en mateno aŭ vespero. Sed nun, kiam vagonaro preterpasas min, mi jam ne gapas al ĝi kiel en mia infaneco, sed nur mallevas la kapon kaj fiksas la rigardon sur la trako³. Mi vidas, ke la reloj fleksiĝas, kiam la radoj de vagonaro ruliĝas sur ilin; sed kiam

la radoj forglitas, la reloj tuj revenas en la antaŭan rekteman.

Mi laŭdas fervojon, ĉar ĝi estas la plej sentima kaj sindona en la mondo. Ĝi plej fidele servas sur sia posteno⁴ sen ia ajn plendo. Ĉu sub la varmega suno, ĉu en frosta ventego, ĝi ĉiam plenumas sian devon. Kaj luksan ekspreson⁵, kaj pezegan varvagonaron, ĝi akceptas kun sama sincereco. Ĝi havas perfektan kunagon kun ĉiuj ŝpaloj⁶ kaj neniam disiĝas de ili.

Imagu, kia terura malordo prezentiĝus al la homoj se fervojo malaperus el la mondo. Tiam kotono, greno, fruktoj kaj aliaj putriĝus en la kamparo; karbo kaj petrolo ne povus transportiĝi aliloken, pro kio oni ne povus varmigi siajn ĉambrojn.

FORPASIS FAMA ĈINA

ESPERANTISTO

TIKOS

En funebra halo por s-ro Tikos



En la 6-a de novembro 1983, 76-jara Tikos forpasis post longa malsano. Li estis membro de la Kvina Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, konsilanto de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj ekskonsilanto de la redakcio de *El Popola Ĉinio*.

Kamarado Tikos estis fama veterana esperantisto de Ĉinio. Ekde tridekaj jaroj li jam komencis siajn progresemajn esperantajn aktivadojn kaj faris siajn kontribuojn por disvastigi Esperanton en Ĉinio kaj per ĝi raporti al alilandaj popoloj pri la kontraŭjapana nacistava batalo de la ĉina popolo, kun la celo komprenigi alilandajn popolojn pri la justa afero de la ĉina popolo kaj gajni iliajn simpatiojn kaj subtenon. Post la Liberiĝo, li longtempe okupiĝis pri esperanta tradukado kaj faris multajn klopodojn por kulturi junajn esperantistojn. En la lastaj kelkaj jaroj, kiam li kuŝis sur la lito pro grava malsano, li ankoraŭ zorgis kaj plene fidis pri nia esperanta afero.

Por funebri pro kamarado Tikos, la Ĉina Esperanto-Ligo, la redakcio de *EPC* kaj esperantistoj de Pekino okazigis kunvenon je la 12-a de nov. 1983, en la halo de Babaoŝan-a Revoluciista Tombejo en Pekino. Funebrajn kronojn al li prezentis la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, la Amikoj de Esperanto, la Kultura Ministerio kaj la esperantaj asocioj de Pekino, Ŝanhajo, Hubei, Jiangsu kaj aliaj provincoj kaj urboj. Krome, pro lia forpaso multaj lokaj esperantaj organizoj kaj famaj esperantistoj sendis kondolencajn telegramojn.

Se vi volus renkonti vian amatinon kiu loĝas en alia urbo, vi kompreneble, povus veturi per aviadilo aŭ aŭto, sed kiamaniere oni portus al vi benzinon? . . . Ho, ĉielo, mi ja perdis la kuraĝon imagi plu. Mi povas fari nenion alian krom refoje laŭdi fervojon kun plena pieco, pro ke ĝi postulas nenion farante multajn servojn al la homoj.

Novaj Vortoj

1. **konturo:** linio, kiu limigas ekstere objekton.
2. **gapi:** senpense kaj iom stulte rigardi, malfermante la okulojn kaj ofte ankaŭ la buŝon.
3. **trako:** la du reloĵoj, sur kiuj kuras vagonaro.
4. **posteno:** estimata ofico, plenumata de iu.
5. **ekspreso:** rapida vagonaro.
6. **ŝpalo:** longa dika lignopeco, sur kiu estas fiksitaj la reloĵoj.
7. **benzino:** brulaĵo por motoroj.

Fervojo sur Monda Tegmento

EN la eterne dormanta montaro sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo, konata kiel monda tegmento, aŭdiĝis sirenado de trajno. Ekfunkciis la unua parto de la Qinghai-Tibeta Fervojo, de Xining, la ĉefurbo de Qinghai-provinco, ĝis Golmud ĉe Kunlun-montaro en okcidenta Ĉinio. La fervojo kune kun la Qinghai-Tibeta Aŭtoŝoseo kaj la aerlinio plifaciligos la trafikon inter la Tibeta Aŭtonoma Regiono kaj la internaj partoj de Ĉinio.

GRANDIOZA KONSTRUO

La Qinghai-Tibeta Fervojo estas unu el la gravaj konstruoj de Ĉinio. Ĝi ligiĝas oriente kun la Lanzhou-Qinghai-a Fervojo, pere de kiu Qinghai-provinco havas trafikon kun Pekino kaj aliaj landpartoj.

La unua parto de la Qinghai-Tibeta Fervojo havas longecon de 834 kilometroj, el kiu la parto de Xining ĝis Hargai, kun longeco de 181 kilometroj, ekfunkciis en 1975; tiu de Hargai ĝis Keke, kun longeco de 249 kilometroj, malfermiĝis al trafiko en januaro de 1983; tiu de Keke ĝis Golmud, kun longeco de 404 kilometroj, eklaboris en marto de 1982. La dua parto de tiu fervojo komenciĝos de Golmud, la dua urbo de Qinghai, tra la Kunlun-montaro altan je pli ol 4 000


metroj super la marnivelo kaj Tanggula-montaron altan je pli ol 5 000 metroj super la marnivelo, eniros la Tibetan Aŭtonoman Regionon kaj finiĝos en Lhasa, la ĉefurbo de Tibeto. La dua parto longos ĉ. 1 200 kilometrojn.

VENKI MALFACILOJN EN KONSTRUADO

La fervojo tra la Qaidam-basenon estas la unua fervojo konstruata sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo. La unua parto de tiu fervojo trapasas lokojn frostajn, sekajn kaj vento-oftajn, ĝenerale pli ol 3 000 metrojn altajn super la marnivelo. Tie la aero estas maldensa kaj oksigen-tena kvanto en la aero estas nur 60-70% de tiu sur la maro. La jara meza temperaturo estas inter 5°C kaj -6°C, kaj la plej malalta temperaturo -40°C. La jara pluvokvanto estas nur 15-400 mm, sed la jara elvaporiga akvokvanto atingas 1800-3600 mm, tial en iuj lokoj mankas ĉe trinkakvo. La venta tempo daŭras 70-110 tagojn en unu jaro; la vento super oka grado furiozas 60-70 tagojn; iam sablo portita de ventego enterigis la fervojon ĉe en unu nokto.

Guanjiao-monto 4 000 metrojn alta super la marnivelo estas la orienta pordo de Qaidam-baseno. Ĝi staras kiel natura ekrano, baranta la vojon al la okcidento. Tie la ĉinaj fervojistoj faris

Konciza Mapo pri la Qinghai-Tibeta Fervojo



1. Pekino
2. Xining
3. Hargai
4. Qinghai-lago
5. Tianjun
6. Delingha
7. Qarhan-sallago
8. Qarhan
9. Golmud
10. Lhasa



Tuneloj en Xitie-monto



La Stacio de Golmud

tunelon je 4 009 metroj longan. Ĝi, ĉe la loko 3 700 metrojn alta super la marnivelo, laŭ la situo estas la plej alta fervoja tunelo en Ĉinio.

La fervojo trairas ankaŭ la salan lagon Qarhan en la meza parto de Qaidam-baseno. La bordo de la lago kun longeco de pli ol 40 kilometroj estas danĝera zono. Je facila skuado tuj moliĝas la grundo. Se oni iom malstreĉus sian atenton, oni falus en ĝin. Por konstrui la fervojon la laboristoj enbatis en ĝin pli ol 50 000 fostojn kaj enverŝis pli ol 40 000 kubmetrojn da gruzoj.

22 FERVOJAJ BRANĈOJ POR SPECIALA UZO

Aldone al la trunka linio de la unua parto de la Qinghai-Tibeta Fervojo oni konstruis 22 fervojbranĉojn kondukantaj al sallagoj, karbominejo, minejoj de neferaj metaloj, konstruataj fabrikoj kaj transportaj stacioj.

Qinghai-provinco estas riĉa je sallagoj. Qaidam en la mongola lingvo signifas "sallago". En Qaidam-baseno troviĝas 30 lagoj, el kiuj 24 estas salaj. Pro tio la konstruado de la fervojbranĉoj kondukantaj al sallagoj estas atentata. La 42-kilometra branĉo de Caka estas konstruita por faciligi sal-transportadon el Caka-lago. La lago kun areo de 105 kvadrataj kilometroj kaj rezervokvanto de 450 milionoj da tunoj da salo estas ekspluatata jam pli ol 200 jarojn. La salo de tiu lago entenas natrian kloridon je pli ol 90%. De 1980 ĝis junio de 1983 estis elportitaj pli ol 177 000 tunoj da salo el tiu loko.

Nun estas en konstruado la fervojbranĉo al Keke-sallago, kiu havas areon de 119 kvadrataj

kilometroj kaj rezervokvanton de 900 milionoj da tunoj da salo. Nun tie oni konstruas ankaŭ salprilaborejon.

Alia fervojbranĉo kun longeco de 16.4 kilometroj kondukas al la stano-zinka minejo ĉe Xitie-monto. Ĝi kreas favorajn kondiĉojn por ekspluati tie la minaĵon. La konita rezervokvanto de stano-zinka erco kunekzistanta kun oro kaj arĝento atingas 30 milionojn da tunoj. Laŭ plano la minejo ekfunkcios en 1986.

La fervojbranĉo ĉe Golmud servas por transporti varojn de internaj lokoj al transporta stacio, de kie la varoj estas transportitaj plue al Tibeto per aŭto. Laŭ statistiko, de 1981 ĝis junio de 1983 oni transportis en Tibeton 300 mil tunojn da varoj per la fervojo, kies transporta kosto estis je 12 milionoj da dolaroj malpli multa ol tute per aŭto.

VOJO AL FELIĈO

Poefago estis unika trafikilo sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo en la historio. En la kvindekaj jaroj de la nuna jarcento la ĉina registaro investis grandan sumon por konstrui la Qinghai-Tibetan Aŭtoŝoseon 1 600 kilometrojn longan de Xining ĝis Lhasa, sed ĝi ne povis kontentigi la bezonon. Post kiam la unua parto de la fervojo malfermiĝis al trafiko, ĝi faciligis ne nur transportadon de varoj, sed ankaŭ kontaktiĝon de diversnaciecaj popolanoj de tiuj du lokoj. Laŭ nekompleta statistiko de novembro de 1979 ĝis junio de 1983 la fervojo transportis 550 000 homfojojn.

Diversnaciecaj lokanoj, kiuj estas multe favorataj de la fervojo, nomas ĝin vojo al feliĉo.

Malsanula lito en hejmo

Ŝi, juna kuracistino, milda kaj gracia, eliris el sia hospitalo, kun stetoskopo, arteria tensiometro kaj blanka kitelo. Mi sekvis ŝin tra la loĝkvartalo ĉe la bazaro Dongxing en la urbo Tianjin por viziti malsanulojn, kiujn ŝi devis kuraci. Nia lasta vizitato estis kormalsanulo Yu Fuquan. Apenaŭ la kuracistino vokis ĉe lia pordo, aŭdiĝis la respondo de lia familiano.

“Ho, estas vi, doktoro Chen, bonvolu enveni!”

Jes, venis ĝuste kuracistino Chen. Por kuraci la kormalsanon de Yu Fuquan, ŝi ofte vizitis lin, almenaŭ du fojojn ĉiusemajne. Ŝi nomiĝis Chen Jiaping. La familianoj de la malsanuloj ĉiam kun rideta mieno traktis ŝin kiel sian parencon.

La kuracistino kondukis min en la ripozĉambron de Yu Fuquan, kiu sidis sur sofo ĉe akvario kaj ĝojplene rigardis orfiŝojn. Li diris al mi, ke li suferas kormalsanon jam tridek jarojn kaj devis kuŝi sur lito pro serioza kora malfortiĝo kaj ofta palpitaĉio. Li plurfoje vizitis grandajn hospitalojn, kiuj tamen ne resanigis lin. Antaŭ duonjaro kuracistino Chen alvenis kaj aranĝis malsanulan liton en lia hejmo.

“Kiajn avantaĝojn havas la hejma malsanula lito?” mi demandis Yu.

“Tia lito estas tre oportuna por ni, maljunaj malsanuloj,” li ĝojis. “Grandan malfacilon mi havis antaŭe! Mia hejmo longe distancas de la grandaj hospitaloj, kaj plie trafikilo mankis al

mi, ne-irpovanto. Por akompani min al hospitalo, miaj edzino kaj gefiloj devis peti forpermeson de sia oficejo. Kiom da iliaj laborhoroj mi konsumis! Doktoro Chen ofte vizitis min. Tio trankviligis min kaj liberigis miajn familianojn de ĝenateco.”

“Ĉu tio efikas?” mi demandis refoje.


“Vidu, ĉu mi ne bone sidas! Sen hejma malsanula lito hodiaŭ mi ne povus babili kun vi ĉi tie anstataŭ sur lito. Nun mi povas ne nur forlasi liton, sed ankaŭ promeni eksterdome.”

La malsanulo daŭrigis, ke foje li prenis tro da kardiotoniko kaj toksiĝis. Subite ĉesis bati lia koro kaj lia vivo estis en danĝero. Ĝuste en tiu momento venis kuracistino Chen. Ŝi faris al li urĝan helpon kaj lin eldanĝerigis. Dum la rakontado li opiniis hazarda sian reviviĝon kaj iom sentis posttimon. “Estas

doktoro Chen, kiu savis min,” li ekscitiĝis.

Ekridetis Chen, kiu staris apud mi. Ŝi ĝojis pro resaniĝo de la paciento. Ofte naskiĝis ĉe ŝi tia ĝojo, ĉar dum la pasintaj du jaroj ŝi starigis hejmajn malsanulajn litojn en la loĝkvartalo kaj resanigis pli ol cent suferintojn. Nun ŝi ankoraŭ prizorgas 27 tiajn pacientojn.

Fakte ne sole ŝi prizorgas pacientojn en ilia hejmo. En la loĝkvartala hospitalo, kie ŝi laboras, oni fondis sekcion de hejmaj malsanulaj litoj, kie laboras sep kuracistoj ĉin- kaj okcident- medicinaj kaj unu flegistino. Doktorino Chen, kiu finis sian studon en medicina instituto, sin okupas pri la okcidenta medicino kaj iom scias la ĉinan medicinon. Nun ŝi estras la nomitan sekcion. Same kiel ŝi, ŝiaj kamaradoj starigis similajn litojn por liberigi maljunajn pacientojn de la suferoj. Laŭ regulo, unu kuracisto devas prizorgi 15 tiajn pacientojn, sed ili starigis entute 120 litojn en la loĝkvartalo kun dekmil familioj. Ili aplikis la ĉinan kaj okcidentan medicinojn aparte aŭ kombine, masaĝon,



Kuracistino Chen Jiaping ekzamenas malsanulon en lia hejmo.

akupunkturon k.a. al tiuj, kiuj suferas koronarian kormalsanon, pulm-emfizeman kormalsanon, hipertension, gravan artriton, diabeton kaj aliajn 13 kronikajn kaj oftajn malsanojn.

En Tianjin funkcias hospitaloj de la urba, distrikta kaj loĝkvartala niveloj. La 88 loĝkvartalaj hospitaloj sporade dislokitaj en la urbo, facile viziteblaj por maljunaj pacientoj, ĝenerale starigis hejmajn malsanulajn litojn. La samon faris ankaŭ tiuj de la urba kaj distrikta niveloj. En la urbo estas 20 000 hejmaj malsanulaj litoj.

Tia estas Tianjin, kiel do estas aliaj lokoj de Ĉinio? Materialo de la Sanprotekta Ministerio de Ĉinio diras, ke hejmaj malsanulaj litoj stariĝis tra la lando, ne nur en urboj, sed ankaŭ en vilaĝoj. Ekz-e, la urbo Pekino kaj la nordorientaj provincoj Heilongjiang kaj Liaoning ĉiu havas pli ol 10 000 tiajn litojn.

Oni iniciatis hejmajn malsanulajn litojn en la kvindekaj jaroj en Tianjin. Sed tiam oni servis nur al maljunaj pacientoj, al ili porti medikamenton kaj fari injekton kaj simplan kuracon. Tio daŭris ĝis la komenco de la okdekaj jaroj. Antaŭ du jaroj la magistrato de Tianjin donis grandan atenton al tiu afero. Ĝi faris iujn aranĝojn kaj ellaboris administran sistemon. La lito-prizorgantaj kuracistoj fariĝis pli devokonsciaj. Same kiel kuracistoj de grandaj hospitaloj ili pretigis dosierojn por pacientoj kaj faris al ili periodan ekzamenon. La kuracistoj praktikis samtempe la ĉinan kaj okcidentan medicinojn dum diagnozado, aplikis plurajn kurac-metodojn kaj atente flegis la malsanulojn. Ili traktis siajn malsanulojn kiel iliajn familianojn: ili vestis kaj manĝigis ilin, dekoktis por ili drogherbojn kaj purigis por ili la medion. Tiel, anstataŭ rondiran kuracadon, ili faris ĝeneralan prizorgadon de la surlitaj malsanuloj kaj ilia kuracarto iom perfektigis.

loj kaj ilia kuracarto iom perfektigis.

Mi intervjuis iujn kuracistojn, malsanulojn kaj ties familianojn, kiuj unuvoĉe laŭdis, ke la hejmaj malsanulaj litoj kontentigas la bezonon de la popolo. La kaŭzo kuŝas en tio, ke Tianjin kiel aliaj urboj havas financan malfacilon en disvolvo de la sanprotekta afero, ne povante tuj investi grandan monsumon por fondi pli da hospitaloj kun pli da malsanulaj litoj. Pro multaj malsanuloj kaj nesufiĉeco de tiaj litoj neeviteble estiĝis malfaciloj por pacientoj viziti kuracistojn kaj ricevi kuracon en malsanulejo. En Tianjin apenaŭ tri malsanulaj litoj estas disponeblaj por ĉiu milo da loĝantoj, kaj ĉiujare 400 000 pacientoj bezonas enhospitaliĝon, sed el ili nur 300 000 povas enhospitaliĝi. La ĝenerala starigo de hejmaj malsanulaj litoj solvas la supre menciitajn malfacilojn. Kuracistoj diris al mi, ke kvankam malsanulaj litoj en hejmo ne povas anstataŭi tiujn en hospitalo kaj oni ne devas rigardi ilin egale, tamen ili ludas malsaman rolon.

Interkonsiliĝas kuracistoj de la loĝkvartala hospitalo de Xiaobailou de Tianjin antaŭ vizito al siaj pacientoj.




Oni starigis hejmajn malsanulajn litojn por doni oportunon al malsanuloj kaj malpezigi ilian ekonomian ŝarĝon, tial oni postulas ĉiumonate de ili po 7.6 juanojn (ĉ. kvar usonajn dolarojn) por kuracado kaj prizorgado. Tiom da mono egalas nur unutagan koston de kuracado en malsanulejo. Per tiaj litoj oni povas ĉiujare ŝparigi al la urbo 600 000 juanojn por la ŝtatpaga kuracado en la malsanulejoj. Liu Guangjian, estro de la Hospitalo de Xiaobailou-loĝkvartalo de Tianjin, diris al mi: "Jen rimedo, per kiu la ŝtato povas havigi al pacientoj kiel eble plej mul-

(Daŭrigo sur p. 20)

Gaja Festo de Taj-oj kaj Ĝingpo-oj

(BV. LEGI LA ARTIKOLON "VIZITO AL MANGSHI" EN TIU ĈI NUMERO)

Fotoj de LI CHONGZHI kaj KANG PING



Urbanoj de Mangshi festas la 30-an datrevenon de la fondiĝo de la Dehong-a Taj-a kaj Ĝingpo-a Aŭtonoma Subprovinco de Yunnan-provinco.

Taj-aj virinoj en dancado





Vicsubprovincestro Dao Anju (taj-o, la unua de maldekstre) parolas en la kunveno.



Taj-a danco





Gingpo-aj virinoj



Lisu-aj junulinoj
en festaj vestoj

Benglung-a junulo ludas
naciecan muzikilon.



Diversnaciecaj popolanoj
dancas sur la placo kaj
stratoj de Mangshi.






Lisu-aj reprezentantoj sur spektejo



Ekspozicio de naciecaj belartaĵoj, fotoj kaj kaligrafiaĵoj aranĝita de la subprovinca kulturdomo. Jen vizitantoj rigardas ĝingpo-an kaligrafiaĵon.



Ekspozicio por la 30-a datreveno de la fondiĝo de la subprovinco

Vintra vojaĝo al Heilongjiang-provinco

VENAS vintro kaj neĝblanke vestiĝas la vasta tero norde de la 40 gradoj de la norda latitudo en Ĉinio.

Kompreneble estas domaĝe perdi la ŝancon ĝui la grandiozajn vintrajn pejzaĝojn por la vojaĝemuloj. Ni do veturis al Heilongjiang, la plej norda provinco de Ĉinio, kaj avide rigardis tian originalan belon.

EN HARBIN

En la fama norda urbo Harbin, ĉie videblas elegantaj vilaoj kaj laktokoloraj domoj kun konusaj

aŭ kupolaj tegmentoj. Malmodernaj tramoj tintante kuras en la urbocentro. Junaj knabinoj en malpezaj kaj ĉarmaj peltaĵoj aŭ lanugaj vestoj kaj ledbotoj iras tien kaj reen sur glaciaj stratoj, manĝante sukerumitajn kratagfruktojn kaj grandajn glaciaĵojn, ŝercante unu kun alia. Tio multe interesis sudajn vojaĝantojn, ankaŭ ni volis aĉeti glaciaĵon por gustumi, tamen ni ne povis elteni tian ĝuon!

Ĉiuj familioj de la harbinanoj havas "grandan naturan fridujon", kio estas fiero de la loka-



noj. Dum la feriaj tagoj de la Printempa Festo, por ŝpari kuirtempon kaj bone sin distri oni metas ekster la domon la preparitajn kokaĵon, anasaĵon, fiŝon, porkaĵon kaj pasteĉojn. En tagoj de malpli ol 20 gradoj sub la nulo oni neĝkovras la manĝaĵojn por ke ili ne sekiĝu, nek perdu la freŝecon. Noktomeze de la novjara antaŭvespero laŭ la luna kalendaro oni kuiras la glaciigintajn pasteĉojn en la bolanta akvo kaj post nelonge oni povas frandi la bongustaĵojn freŝajn kiel ĵus pretigitajn. Nemalmultaj vojaĝantoj el la sudo kunportas sakon da glaciigintaj pasteĉoj hejmen por ilin ĝui kune kun siaj familianoj.

GLACIAJ LANTERNOJ

Glaciaj lanternoj aperis antaŭ ĉ. cent jaroj kaj rigardi ilin fariĝis nepre distrado por la loĝantoj de la urbo en la jarfino. Vintra frosto daŭras 4-5 monatojn en Harbin, pro kio oni povas rigardi la glaciajn lanternojn eĉ en marto. Starante sur la glaciiginta rivero ni rigardas la glaciakistojn, kiuj kriante trenas disigitajn grandajn glaciblokojn 1-2 metrojn dikajn el la rivero. Post tio oni komencas tajli la glaciojn laŭ la dikeco, eltenpovo kaj travidebleco. Oni diris

Glacia skulptaĵo «Nezha Tumultigas la Maron»



al mi, ke en la urbo ĉiujare miloj da urbanoj partoprenis en la tajlado kaj skulptado de glaciaj lanternoj. Tio vere estas granda aktivado.

Falas vespera krepusko. Sate sin amuzinte per petardoj, oni ĝoje iras viziti parkojn similajn al kristala palaco. En la vasta parko ĉie brilas arĝentaj arboj kaj lumas travideblaj domoj. Ruĝaj, flavaj, verdaj kaj bluaj lanternoj radias sur sennombraj glaciaj miniaturaj, skulptaĵoj, metiartaĵoj k.a. Tie troviĝas kaj altaj imponaj glaciaj konstruaĵoj kun komplikaj strukturoj kaj glaciaj miniaturaj skulptaĵoj. En la travidebla longa glaci-koridoro estas englaciaj ruĝaj kaj blankaj karpoj, diversaspecaj salikokoj kaj kraboj, kiuj jen lumiĝas, jen mallumiĝas en muziko de elektronika instrumento. La medio impresas kiel mara mondo. Turistoj el la Filipinoj, Tajlando, Hongkong kaj Aomen ĝoje vestas la afablan glacian longevivulon per pelta ĉapo, kolumo kaj okulvitroj. Japanaj turistoj ŝerce diris ke la ĉinaj glaciaj skulptaĵoj estas fratinoj de tiuj de Sapporo, Japanio.

EN LA MARO DE NEĜKOV-RITAJ ARBAROJ

Forlasinte Harbin, post 4-hora veturado per trajno ni atingis la primitivan arbaran regionon Taoshan, la plej frue malfermitan en Ĉinio arbaran turisman lokon en la suda Malgranda Xing-an-Montaro. Dank' al multjara montblokado tie jam grupiĝis sovaĝaj bestoj, kiaj cervoj, kapreoloj k.a.

Enirinte la arbaron maljuna olunĉuna ĉasisto-koĉero sur sledo gaje rakontis al ni, kiel distingi la spurojn de ruĝa cervo, apro, vulpo, lupoj kaj urso. Li, kun rideto, klarigis al la vojaĝantoj, ke la bestoj ne kuraĝas sin montri antaŭ la homamasoj kaj ili regas la arbaron nur nokte.

Post peniga surgrimpado de la montosupro prezentiĝas antaŭ ni la senlima arbaro: tie prosperas centoj da specoj de valoraj arboj kiaj ruĝa pino, abio, kverko k.a. La diversaj arbustoj formis ŝirmejojn por la bestoj. Kapreoloj, neĝleporoj, sciuroj, lupoj, cervoj, fazanoj kaj aliaj birdoj ofte fariĝas ĉasaĵoj de tieaj loĝantoj. Neĝado daŭras tie ses monatojn,

kiuj estas ora sezono por ĉasado. Nia vojgvidisto diris al ni, ke estas tre interese ĉasi fazanojn. En la monto kovrita de ĝisgenue dika neĝtavolo, se vi maltrafas la fazanon je la unua pafo, vi ne bezonas pafi duafoje. Tiam vi bezonas nur postkuri la fazanon. Post mallonga kurado ĝi ŝovos la kapon en neĝan tavolon kaj tiam vi ĝin kaptos certe.

Apud la primitiva arbaro estas skiejo. Ni, turistoj el la sudo, ĝojplene portas skiojn sur la piedoj, sed ŝanceliĝas antaŭen kaj malantaŭen kaj ne kuraĝas fari eĉ unu paŝon. Glitante malsupren laŭ la montodeklivo ni ofte falas dorsen en la spongan neĝon pro timemo.

Fininte nian "luktadon" en neĝo, ni venis en varman hotelon de la vilaĝo Taoshan kaj tie prenis apetitvekan manĝon preparitan el ĉasaĵoj. Tie oni povas manĝi la kvar rarajn bongustaĵojn de la provinco: urso plando, tetrao, alka nazo kaj simiokapa fungo. Tie estas ankaŭ rostita cervaĵo, fumaĵita fazanaĵo, stufita leporaĵo k.a. Estas ne forgeseble por ni, lacigitaj vojaĝantoj, manĝi tiujn bongustaĵojn.

(Daŭrigo de p. 18)

tajn kuracojn je minimuma kosto." Tio utilas kaj al la ŝtato kaj al la paciento.

La rimedo alportas utilon ankaŭ al la kuracistoj. Antaŭe al la kuracistoj de la loĝkvartalaj hospitaloj mankis praktika sperto kaj estis malfacile por ili levi kuracarton pro ilia plena okupi-

ĝo je akcepto de pacientoj. Nun dum sia prizorgado de hejmaj malsanulaj litoj ili renkontis diversajn malsanojn, tio akcelis ilin al serioza studo por serĉi bonajn kurac-metodojn kaj akiri novajn sciojn.

La ĝisnunaj hejmaj malsanulaj litoj estis ekipitaj nur per medikamentujo, stetoskopo, arteria tensiometro kaj elektrokardio-

grafo. Mankis al ili X-radia, fizioterapia kaj aliaj avangardaj aparatoj portebaj. Hodiaŭ oni povas kuraci nur dekkelkajn oftajn malsanojn, sed ne la komplikajn. Por pli bone servi la hejmajn malsanulajn litojn, oni klopodas aldoni instalaĵojn kaj diligente lernas por kuraci pli da malsanoj kaj pli da pacientoj.

NOVAJ INDUSTRIAJ PRODUKTAĴOJ EKSPONATAJ EN PEKINO

Novembre de 1983 okazis en Pekino ekspozicio de novaj industriaj produktaĵoj, la plej granda en la 34 jaroj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko.

La ekspozicio celas disvolvi novajn industriajn produktaĵojn kaj akceli la teknikan progreson. Ĝiaj pli ol 7 000 ekspoziciaĵoj elektitaj el granda nombro da novaj industriaj produktaĵoj de 29 ĉinaj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj ĝenerale enkorpiĝas la novan disvolviĝon de diversaj industriaj branĉoj en la lastaj 3 jaroj. Multaj ekspoziciaĵoj kvalite atingis aŭ preskaŭ atingis la internacian avangardan nivelon en la 70-aj jaroj aŭ en la komenco de la 80-aj jaroj. Granda parto el ili unuafoje aperas en Ĉinio aŭ estas kvalite kompareblaj kun aliaj avangardaj produktaĵoj de la sama kategorio.

EFIKAJ TEKNIKAJ RENOVIGOJ

Laŭ statistiko, 7 360 objektoj de teknikaj renovigoj de Ĉinio konstruiĝis kaj komencis produktadon en la unuaj 9 monatoj de 1983. La investo de 26 el ili ĉiu superis kvin milionojn da juanoj. Dank' al ili pligrandiĝis la produk-

topovo de nafto, karbo, elektro, cemento, glaco, sinteza amoniako, kotonaj teksaĵoj kaj biero, interalie tiu de nafto altiĝis je 5.34 milionoj da tunoj, 67-pocente pli multe ol tiu pliigita en 1982. La statistiko diras, ke nombro da energio-ŝparaj teknikaj renovigoj povas ŝpari 40 000 000 kilovatthorojn da elektro, 220 000 tunojn da karbo kaj 36 000 tunojn da brul-oleo ĉiujare. Kondukante la teknikajn renovigojn, diversaj departementoj kaj regionoj donis sian atenton al la plibonigo de la kvalito de produktaĵoj, la pliigo de iliaj specoj kaj la altigo de ekonomia efiko, por ke la investado por teknikaj renovigoj estu pli racia.

MIKROKOMPUTILOJ EFIKE APLIKATAJ

En la lastaj jaroj Ĉinio atingis ĝojindajn sukcesojn en la apliko de mikrokomputiloj por la aŭtomata regado en industria produktado. Tra la lando 13 000 mikrokomputiloj estas uzataj en la malpeza industrio kaj en konstruado.

Post kiam mikrokomputila aŭtomato por "rekta kontrolado" instaliĝis en la teksejo de la Dua Kotona Tekstila Fabriko de Nantong, oni povas tuj informiĝi per la ekranoj de la kontrolejo, sur kiu teksilo rompiĝis varpo aŭ vefto, de kiu teksilo oni devas demeti la ŝtufon, ktp, tiel ke multe maloftiĝis la haltigo de maŝinoj kaj la efiko de ĉiu teksilo leviĝis je 1.5-2%.

ALIA RIĈA RIKOLTO DE KOTONO


Ĝis la 25-a de nov. 1983 la komercaj departementoj de Ĉinio aĉetis entute 3.55 milionojn da tunoj da sensemigita kotono, je unu miliono da tunoj pli multe ol en la sama periodo de 1982, superplenuminte sian planon pri koton-aĉetado en la jaro 1983.

Dum 1978-1982 la hektara produktokvanto de kotono 66-pocente pligrandiĝis en Ĉinio. En 1983 la produktokvanto plie kreskis malgraŭ la plagoj de superakvo kaj sekeco. Oni taksas, ke la kotono aĉetita de la ŝtato en 1983 estos 10-pocente pli multa ol tiu en 1982.

SUBTILAJ FREMDAJ SUBSTANCOJ ESTAS FORIGEBLAJ

Novaj filtro-pogutigilo kaj mikro-filtrilo por forigi fremdajn substancojn el injektaĵoj dum klinika pogutigado estis kvalifikitaj en la urbo Hangzhou. Tiu sukceso helpas Ĉinion ŝtopi breĉon en la tekniko de injektaĵo-preparado.

Simplaj kaj oportunaj, tiuj malgrandaj aparatoj, provizitaj per filtraj membranoj kun malsamaj poroj, povas forigi el medikamentoj kaj pogutigaj instalaĵoj subtilajn malpuraĵojn, bakteriojn aŭ aliajn kristalajn substancojn formitajn dum miksiĝo de medikamentoj.



Karikaturo

Legi ĵurnalon

de ZHU SENLIN



Tigroj

ĈE Printempa Festo mia penso facile glitas al sopiro pri la ksilografia novjara bildo de mia hejmloko, Wuqiang-gubernio de Hebei-provinco.

Klare presiĝas en mia memoro la okazintaĵo: Estis frosta vintra nokto antaŭ 30 jaroj. Flirtis neĝ-flokoj ekster la domo. Mi, en novaj festaj vestoj, min apogis al la sino de mia avino kaj atente aŭskultis ŝian rakonton:

Antaŭ longe vivis maljuna avino. Ŝi vivis solece sen infano. Foje ŝi iris al foiro kaj aĉetis por si novjara bildon kun bela knabino. Ŝi pendigis la bildon sur la muron. La sekvantan matenon, kiam la avino iris en la kuirrejon por prepari matenmanĝon, ŝi trovis kun surprizo, ke matenmanĝo estis jam preta. Ŝi konjektis, ke eble iu bonkora najbaro faris tion por ŝi. Sed tio ripetigis

ZHENG ZHENJIE:

La ksilografiaj novjaraj bildoj de mia hejmloko

en pluraj sinsekvaj tagoj, kio ŝin maltrankviligis. Foje ŝi do ŝajnis sin foriranta por kolekti brulignojn, kaj kaŝis sin ekstere kaj subrigardis en la ĉambro tra la fenestro. Kun mirego ŝi vidis, ke la knabino sur la bildo descendis, kombinte al si la harojn. Kun granda ĝojo, la avino entrudiĝis, deŝiris la bildon kaj ĵetis ĝin en fajron. De tiam la knabino neniam forlasis la avinon.

La legendo vaste cirkulanta en mia hejmloko esprimis admiron de la lokanoj al la artaĵoj ŝatataj de ili.

La naskiĝo de ksilografia novjara bildo de Wuqiang estas strikte ligita kun la tradicia Printempa Festo de Ĉinio.

Printempa Festo estas komenciĝo de nova jaro laŭ la ĉina luna kalendaro. En la Printempa Festo oni kutime aĉetas en foiro kelkajn novjarajn bildojn kaj gluas ilin sur la murojn, pordojn aŭ fenestrojn de sia domo. Kiam oni gastigas, manĝas, aŭ virinoj faras kudradon en sia ĉambro, ili povas aprezi samtempe popolajn artaĵojn. Tio sendube aldonis gajecon por la Printempa Festo.

La arto de ksilografia novjara bildo de Wuqiang aperis en Ming-dinastio (1368-1644), floris en la regperiodoj Kangxi (1662-1722) kaj Jiaqing (1796-1820). En la florado de la arto, ĉe la suda parto de la urbo troviĝis 144 butikoj de novjaraj bildoj, kaj en la vilaĝoj ĉirkaŭ la urbo estis multaj metiejoj. Ĉujare, ekde la Aŭtunmeza Festo, la foiro de novjaraj bildoj estis tre viglaj. La vendistoj elmontris novjarajn bildojn en kaj ekster la butikoj kaj la temoj de la bildoj ampleksas teatraĵojn, popolan vivon, infanojn, belulinojn, florojn, pejzaĝojn k.a. En la foiro ĉiam moviĝas maro da rigardantoj, aĉetantoj kaj vendistoj de novjaraj bildoj. En la gubernio loĝis multaj famaj popolaj pentristoj, lertaj gravuristoj kaj spertaj presistoj. La novjaraj bildoj de Wuqiang estas unu el la famaj skoloj de tiu arto de Ĉinio, ĝunte renomon egalan al tiuj de Yangliuqing de Tianjin kaj de Taohuawu de Suzhou.

Kampanoj estas ĉefaj farantoj kaj ŝatantoj de la novjaraj bildoj de mia hejmloko. Iliaj enhavo estas tre riĉaj, la ideoj tute

novaj kaj la figuroj modestaj. Granda parto de la bildoj simbolas bonaŭguron. Ekzemple sana bebo brakumanta grandan karpon simbolas abundan rikolton kaj feliĉan vivon; persikoj kaj gruoj simbolas longavivecon; umefloroj kaj peonioj aludas feliĉon, prosperon kaj riĉecon. La pasinte ofte viditaj bildoj "Pigoj sur Umefloraj Branĉoj", "Bovo Terpluganta en Printempo", "Leono Ludanta Broditan Pilkon", "Plugado kaj Teksado", "Laboroj de Viro", "Laboroj de Virino" k.a. verve prezentis la vivon de laboranta popolo kaj lokan moron. Parto de bildoj montris la deziron de kamparanoj ŝanĝi la medion kaj sopiron al pli bona vivo. Ekzemple "Justa Divido de Kampoj" registris la Agraran Reformon, "Blankhara Knabino" montris oponon de kamparanoj kontraŭ kruela subpremado fare de bienuloj, "Liu Hulan" prikantis junan heroinon ekzekutitan de reakciuloj en ŝia aĝo de 15 jaroj, la bildo "Aŭtuna rikoltado de Interhelpa Grupo" kaj "Riĉa Rikolto de Grenoj" konigis novan vivon en kamparo.

En Wuqiang oni aplikas malmolajn lignojn kiel ksilografiajn tabulojn. La nombro de tabuloj estas deciditaj laŭ la nombro de la koloroj de la originalo. La strukturo de bildoj estas tre harmonia, kaj la linioj fortaj kaj klaraj. Pere de drasta nigro-blanka kontrasto, la ksilografia efiko de la bildoj estas plene vidigita, kaj ankaŭ ĝia klasika kaj simpla stilo en la frua periodo de Ming-dinastio estas konservita. La bildoj de tradiciaj temoj estas pensigantaj pri la ĉinaj klasikaj poemoj; dum la bildoj pri ĉiutaga vivo similas

al simplaj kaj novaj popolkantoj de Hebei-provinco. Kaj la bildoj pri ĉinaj teatraĵoj havas lakonan fon-desegnon, troigitan plastikon, kun vizaĝoj kaj okuloj aparte akcentitaj.

Eble iuj miris, kial oni ne anstataŭigas la manlaboran presadon de la bildoj per la maŝina. La miro solviĝos tuj post kiam tiuj konis la presan proceson de ksilografiaj bildoj.

La farado de ksilografia novjara bildo de Wuqiang havas kvar erojn kiel sian proceson, nome desegnado, gravurado, presado kaj pretigo.


Unue oni kopie desegnas ĉiujn liniojn de sama koloro de origina pentraĵo sur unu papero. La nombro de desegnaj paperoj kongruas kun la nombro de la kolorvarioj de la originalo. Poste oni gluas la kopiaĵojn sur lignotabulojn kaj faras gravuradon. La gravuranto devas bone kompreni la originalon kaj bone koni la intencon de la strekoj, kaj nur tiel li povas faksimile reprodukti la spiriton kaj teknikon de la originalo. Post tio estas presado. Oni presas per la gravuritaj tabuloj unu post alia laŭ ordo de la kolorvarioj. La presitan paperon oni gluas sur pli fortikan paperon laŭ ĉina tradicia metodo, por ke ĝi povu esti pendigita kaj longe konservata.

Moderna presarto povas po- grande kaj rapide produkti presaĵojn laŭ originalo, sed ne povas anstataŭi ksilografian presadon. Maŝinaj kolordivido, plato-farado kaj presado povas konservi la eksteran formon de la originaloj, sed ne povas esprimi la nuancojn

de ksilografiaĵoj. La papero, tuĉo kaj farboj bezonataj de la ksilografiaj novjaraj bildoj de Wuqiang estas tiuj uzataj de ĉinstila pikturo. Se presantoj havas profundan komprenon pri la spirito kaj tekniko de la originalo, li do povas lerte uzi la materialojn, plene vidigi la komplikajn nuancojn de la strekoj kaj koloroj, la mildecon kaj fortecon, la densecon, pezecon, sekecon kaj humidecon de la strekoj. Dank' al tio ne nur la formo, sed ankaŭ la spirito estas reaperigitaj kaj tre similaj al tiuj de la originalo.

Ĉiujare la nombro de venditaj novjaraj bildoj superas duonmilionon. Ili ne nur estas bonvenaj en la provinco, sed ankaŭ estas vendataj kaj eksponataj en aliaj dekelkaj provincoj de Ĉinio.

*Generalo Guan
(Surporda pentraĵo)*



Post aperigo de la 300-a numero de El Popola Ĉinio ni ricevis nombron da leteroj de niaj legantoj, en kiuj ili esprimis varmajn, amikajn gratulojn kaj ankaŭ entuziasmajn laŭdojn pri tiu ĉi revuo. Jene ni publikigas tri el tiuj leteroj, kaj samtempe kore dankas ĉiujn tiujn legantojn, kiuj afable skribis al ni ĉi-okaze.

Ni esperas, ke en la estonteco ankoraŭ plimultaj legantoj kunlaboros kun ni donante proponojn pri la plibonigo de EPĈ aŭ kritikojn rilate al ĝiaj mankoj.

La Red.

KONTRIBUI AL LA TUTMONDA KOMPREENIĜO KAJ AMIKECO

Pluraj membroj de la Esperanta Grupo "Ĝirona Espero", inter kiuj mi estas, ĉiu-monate ricevas vian mirindan gazeton. Ĉiuj legas ĝin tre atente kaj scivoleme, kaj poste, en niaj semajnaj kunvenoj ni komentas la diversajn artikolojn. Komprenoble ne ĉiuj legantoj havas saman opinion pri ĉiu artikolo, tamen ja ĉiuj konsentas ke "El Popola Ĉinio" estas la plej bela, la plej grava gazeto en la nuntempa esperanta mondo.

Dum nia lasta kunveno, kiel kuinte, oni parolis pri via revuo kaj ĉefe ni komentis la fakton, la sukceson de la aperigo de la 300-a numero. Mi legis la mallongan komenton, kiun mi skribis por aperigi en nia malgranda bulteno. Tiam miaj samklubanoj komisiis min skribi al vi por esprimi nian gratulon pro tia granda sukceso, nian dankemon pro via laboro, pro via penado favore al disvastigo de la Esperanta kulturo. Ni dankas ankaŭ la okazon kiun donas al ni "El Popola Ĉinio" am-

pleksigi niajn konojn pri via granda kaj belega lando.

En mia nomo kaj nome de niaj kamaradoj mi esprimas al vi niajn plej sincerajn dezirojn ke via sukceso multe daŭru kaj ke vian celon vi povu tute plenumi.

Sentime pri eraro, mi povas certigi ke per "El Popola Ĉinio", Ĉinio havas en Katalunio, kaj mi supozas ke ankaŭ en la tuta mondo, multajn amikojn.

JOSEP MASIAS (Hispanio)

DAŪRIGU EN VIA BONE PROVITA MANIERO

Akceptu kun bonvolo mian sinceran gratulon pro la apero de la 300-a numero. Tiu evento estas bona okazo, ja eĉ forta stimulo, por skribi al vi kaj tiel resume respondi al viaj demandoj, kiuj de tempo al tempo akompanas vian revuon en formo de aparta demando.

Estante via fidela abonanto de multaj jaroj, mi bone observis la evoluon de la revuo en la daŭro de la jaroj kaj la speguliĝon en

ĝi de la politika kaj kultura pliliberiĝo. Jam antaŭ tiuj ŝanĝoj EPĈ estis leginda kaj aboninda revuo pro la relativa multflankeco kaj precipe pro la bonaj redaktado kaj aspekto. En tiu tempo kompreneble apenaŭ estis sencele por eksterlanda leganto fari proponojn rilate la enhavon de la revuo, ĉar sendube la redakcio elĉerpis ĉiujn eblecojn konceditajn. Intertempe viaj eblecoj estas pli grandaj kaj do la kritikoj, sugestoj kaj proponoj far la legantoj bonvenaj ĉe viaj skribotabloj. Mi ne dubas, ja ankaŭ jam povis legi en via Leterkesto, ke tiu ŝanco estas uzata de legantoj, des pli ĉar vi ja, kiel dirite, elvokas la dezirojn de la legantoj. Leginda estas ĉio; ke min pleje interesas raportoj pri la pejzaĝoj kaj la historio de Ĉinio, pri naciaj malplimulto, ne signifas, ke aliaj temoj, ekz. pri la ekonomia evoluo de via lando, pri sciencaj progresoj ktp. ne trovas mian ŝaton. La tre belaj kolorbildaj paĝoj ĉiam estas speciala plezuro.

Mi do konkludas: Daŭrigu en via bone provita maniero, kaj via granda legantaro sendube ne nur restos fidela sed helpos gajni novajn amikojn de EPĈ.

**HEINRICH NISCHWITZ
(FR Germanio)**

ILI CERTE INDAS NIAN ADMIRON

Mi ĝoje ricevis la 300-an numeron de via amata revuo El Popola Ĉinio kaj mi prenas la okazon varme gratuli la redakcion kaj ĉiujn kunlaborantojn de la revuo por ilia dediĉita laboro farita al la tutmonda esperantistaro per regula eldonado de ĉi tiu altnivela, belega sed kompare malmultekosta esperanta revuo.

Ekde januaro 1979, mi fariĝis regula leganto de EPĈ kaj mi ĉiam trovis la gazeton tre interesa. Por mi EPĈ estas vera legolibro,

(Daŭrigo sur p. 27)

PEJZAĜO ĈIRKAŬE DE LA MONTO LUSHAN

de HE CHENG

EBLE pro la grandfameco de Lushan, la historiaj objektoj sporade kuŝantaj ĉe ĝia montpiedo malofte vekas ies atenton. Sed fakte ili estas vidindaj kaj mi konsilas al la turistoj ilin rigardi dum la vojaĝo.

ALLOGAJ LAGO KAJ KONSTRUAĴOJ

Norde de Lushan-monto troviĝas antikva urbo Jiujiang kun historio de pli ol 4 000 jaroj. Norde la urbo frontas al Jangzi, la plej longa rivero en Ĉinio, kaj okcidente najbaras al la lago Poyang, la plej granda dolĉakva lago en nia lando. Tie la montoj estas smeraldaj kaj akvoj kristalaj. Tie troviĝas dek vidindejoj.

Unu el la vidindejoj estas la lago Gantang, en la urbo Jiujiang. Apogante sin sur la balustradoj kaj rigardante malproksimen, oni vidas la belan konturon de Lushan-monto kovrita de nebulo. Proksime nebula akvovaporo ŝvebas super la lago. Meze de la lago troviĝas antikva pavilono, ŝajne subportata de fumo kaj nebulo. Jen Nebula Pavilono.

La Nebula Pavilono fakte estas konstruaĵaro kun nigrategolaj tegmentoj kaj blankaj muroj. Ĝi aspektas malluksa, neniom diferenca de ordinaraj domoj, tamen estas fama historia restaĵo. En la periodo de la Tri Regnoj (ko-

mence de la 3-a jc.) Zhou Yu, fama generalo de Wu-regno ekzercis siajn surakvajn trupojn ĝuste sur tiu insuleto. En la 9-a jc., kiam Bai Juyi, granda poeto de Tang-dinastio, funkciis tie kiel prefekto, oni komencis konstrui la pavilonon. La nuna konstruaĵaro estas multfoje riparita en pluraj dinastioj.

La pavilono estas ligita kun la bordo per Naŭ-kurbiĝa Ponto. En la korto de la konstruaĵaro zigzagas vojetoj, ĉio estas brila kaj refreŝiga, prosperas pinoj kaj cipresoj, parfumas floroj, kantas birdoj. Ĉio prezentas vivecan bildon.

En la malantaŭa korto estas kelkaj ĉambroj, kie oni eksponas elterigitajn historiajn objektojn en la regiono Jiujiang, inkl. de ŝtonaj objektoj de la primitiva socio kaj blankaj porcelanaĵoj blu-desegnaj produktitaj en la periodo de la 14-a ĝis 20-a jarcentoj. La eksponaĵoj montras la longecon de la historio de la regiono.

Preterpasinte la ŝprucfonton en la centro de la korto, oni atingas la Luntrempan Pavilonon, konstruitan memore al Bai Juyi. La poeto verkis en Jiujiang faman poemon "Bivo" en kiu troviĝas verso "ĉe la adiaŭo, trempas sin la lun' en la rivero". En la pavilono staras ŝtonaj tabloj kaj benkoj. Estas plezure ripoziti tie, trinkante Lushan-teon

kaj ĝuante la glimbrilan akvon kun kanotoj.

AKVOFALO JADA KURTENO

En Lushan-monto flugas multaj akvofaloj, ĉiu kun sia trajto. La falakvo de Jada Kurteno ĉe la suda montpiedo fariĝas akvo-perloj, kio tre bele aspektas kiel kurteno vidate de proksime.

La akvo falas de sur la krutaĵo pli ol 40 metrojn alta rekte en la profundan lageton, levante akveran nebulon. Fore de la lago impone kaŭras gigantaj rokoj kaj murmuras riveretoj. Proksime de la lago karesas milda vento.

Varias la pejzaĝo en la kvar sezonoj de la jaro. En la pluvozaj printempo kaj somero la akvo torente falas kvazaŭ de sur la breĉita ĉielo, kaj frapiĝas kontraŭ rokojn, eligante montoskuan bruon kaj pluvon da akveroj, kio faras la varmegan someron malvarmeta aŭtuno. Aŭtune kaj vintre, kiam malabundas akvo, la maldikiĝinta falakvo gracie falas en la lageton, kvazaŭ malpeza gazo pendanta en la valo. La nigraj vertikalaj krutaĵoj, la muslinaj akvofaloj, la pinoj kaj bambuoj faras la montaron giganta ĉin-stila rul-pentraĵo.

Ĉe la lagetoj faŭkas ŝtonkaverno kun multaj ŝtonoj en malordo interne. Sur la ŝtonoj oni povas sidi kaj eĉ kuŝi. Antaŭ la kaverno lirlas rivereto. Faskoj da

lumradioj enpenetriĝas en la kavernon. La malvarmeta aero agrable refreŝigas la vojaĝantojn eĉ en varma somero.

DONGLIN-TEMPLO

La templo konstruita en 386 p. K. kuŝas ĉe la nordokcidenta montpiedo. Antaŭ nelonge la popola registaro asignis grandan sumon por riparigi tiun antikvan templon.

La templo sidas en la sino de la verda montaro. Antaŭ ĝi estas klara fonto, nomata Tigra Rojo kun samnoma arkponto. Cirkulas interesa legendo pri tiu ponto: La unua abato de la templo Huiyuan absorbiĝis en menskulturo kaj neniam iris trans la monton. Eĉ adiaŭinte gastojn, li neniam iris pli malproksimen. Se li iris trans la ponton akompanante gastojn, ekmuĝis la dia tigro. Iutage, en intima interparolo li akompanis du amikojn forirontajn kaj transiris la ponton kore interbabilante. Apenaŭ ili faris kelke da paŝoj, senĉese muĝis la dia tigro. Ili tuj ekkomprenis kaj ridis unu al alia kaj disiĝis kun bedaŭro.

LOĜEJO DE TAO YUANMING

La loĝejo de Tao Yuanming, fama idilia poeto de Jin-dinastio (317—420 p. K.) troviĝis ĉe la montpiedo de Lushan. Li iam estis gubernatoro de Pengze, oriente de Poyang-lago kaj post sia ermitiĝo tie havis idilian vivon.

La monto Yujing, kie estas la frua loĝejo de la poeto, limtuŝas norde la monton Kvin Maljunuloj kaj sude rigardas al Poyang-lago. Tie la poeto pasigis sian junecon kaj postlasis siajn spurojn de la idilia vivo. Fronte de la monto fluas rivero, laŭ kiu ja hejmvrenis la ermitiĝinta poeto kaj la senlima kamparo etendiĝanta sudokcidente de la monto estis la "okcidentaj kampoj", admirataj de la poeto.

Antaŭe, en pluva sezono, superakvo ofte englutis fekundajn kampojn, dum en seka sezono forvelkiĝis la plantaĵoj. Sed hodiaŭ komplete ŝanĝiĝis la fizionomio. Grandioza digo kiel giganta drako kuŝas en la valo kaj efike protektas la kamparon de Lushan-regiono.

Je 12 kilometroj for de Yujing-monto estas Lili-vilaĝo, la dua loĝejo de la poeto, kie li ekloĝis la trian jaron post sia ermitiĝo.


La loĝantoj en Lili-vilaĝo ĉiam prenas Tao kiel sian familian nomon. En sia poemo Tao Yuanming iam priskribis sian idilian vivon:

*Plukante krizantemon ĉe l'
eosta plektbarilo,
Ekvidas mi senvole l' sudan
monton en trankvilo.*

La fonto priskribita de la poeto nun fariĝis varmfonta sanatorio kun "banejo por kamparanoj", kiu akceptas klientojn en ĉiu tempo, ĉu post laboro aŭ en feriaj tagoj.

Antaŭen veturante laŭ ŝoseo sude de la monto oni baldaŭ atingas tombejon de Tao Yuanming. Nun la steleo ĉe lia tombo staras sendifekta, ankaŭ la surskribaĵoj restas klaraj. Ĉio ĉi montras kiel profunde la tieaj loĝantoj amas la poeton. Vizitante la lokon ankaŭ la turistoj ekhavas respektan al la poeto kaj amon al la loko.


LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO




1. Mangshi de Yunnan-provinco
2. Qianxi-gubernio de Hebei-provinco
3. Zunhua-gubernio de Hebei-provinco
4. Tianjin
5. Harbin de Heilongjiang-provinco
6. Primitiva arbaro de Taoshan
7. Wuqiang-gubernio de Hebei-provinco
8. Lushan-monto
9. Jiujiang de Jiangxi-provinco
10. Lintong de Shaanxi-provinco

PEJZAĜOJ DE LUSHAN-MONTO


Fotoj de YANG CAI



Lushan-monto




Pejzaĝo ĉe
la montpiedo





Donglin-templo




La ponto Avalokitesvara

La pitoreskejo Yanshuiting



Akvofalo

MEMORIGAJ POŝTMARKOJ DE LA ĈINA POPOLA RESPUBLIKO PRI ĜIAJ FLAGO, EMBLEMO KAJ HIMNO



中華人民共和國國歌

(义勇军进行曲)

田漢 詞
聶耳 曲

進行曲速度

中華人民共和國第六屆全國人民代表大會

起來！不願做奴隸的人們！把我們的
血肉，築成我們新的長城！中華民族
到了最危險的時候，每個人被迫發出
最後的吶喊。起來！起來！起來！
我們萬眾一心，冒着敵人的炮火前進！
冒着敵人的炮火前進！前進！前進！前進！

中國人民郵政 20分

J. 94. (2-2) 1983

NACIA FLAGO DE ĈINIO

de MEI ZHI


DANK' al sia longa revolucia batalo, la ĉina popolo renversis la reakcian diktatoran reĝimon de Ĉiang Kajšek kaj fondis en 1949 la socialisman Ĉinan Popolan Respublikon. La nova Ĉinio ekhavis sian nacian flagon kun kvin flavaj steloj sur ruĝa fono.

La ruĝa koloro de la flago simbolas revolucion. Sur la flago estas unu granda kaj kvar malgrandaj kvinpintaj steloj; ĉiu malgranda havas unu pinton, rigardantan al la centro de la granda, kio simbolas grandan unuiĝon de la ĉina popolo sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio. La flava koloro de la steloj simbolas lumon sur la ruĝa fono. La modesta kaj majesta flavo ne nur harmonias kun la ruĝo, sed ankaŭ simbolas flavan rason de la ĉina nacio.

La 16-an de junio 1949, antaŭvespere de la naskiĝo de la Ĉina

Popola Respubliko, la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco decidis starigi la komisionon por juĝi kaj difini la projekton de la naciaj flago kaj emblemo, kaj publikigis la anoncon por varbi iliajn projektojn en ĵurnaloj de la 14-a de julio ĝis la 15-a de aŭgusto samjare. Dum unu monato laboristoj, kamparanoj, profesoroj, oficistoj, verkistoj kaj elmiĝrintaj ĉinoj faris sume 3 012 projektojn pri la nacia flago. En septembro la komisiono elektis 38 el ili kaj prezentis ilin al la Unua Sesio de ĈPPIK por diskuti kaj decidi. La reprezentantoj unuanieme elektis la ruĝan flagon kun kvin steloj kiel nian nacian flagon. La 27-an de septembro la projekto estis oficiale aprobita. La 1-an de oktobro Prezidanto Maŭ Zedong persone hisis tiun flagon sur la placo Tian'anmen kaj proklamis la naskiĝon de la Ĉina Popola Respubliko.

Por ĝuste fari la nacian flagon de la Ĉina Popola Respubliko



La projektinto de la flago estas Zeng Liansong, kiu plenumas ekonomian laboron. Ekde sia infanaĝo li jam havis fortan inklinon verki poemon, pentraĵon kaj kaligrafiaĵon. Laŭ la postuloj, ke la nacia flago devas esti modesta kaj majesta, enkorpigante en si la ideon de la popola demokratia ŝtatpotenco kaj karakterojn de la ĉinaj historio, geografio, nacio kaj kulturo, li projektis la nunan nacian flagon.

La flago estas rektangula, kaj la proporcio de ĝiaj longeco kaj alteco estas 3:2. Se ni difinas, ke la flagstango en la blanka flagingo estas maldekstre, do la granda stelo estas maldekstre kaj la kvar malgrandaj steloj dekstre de ĝi. Por konigi al niaj legantoj la pozicion kaj proporcion de la granda kaj malgrandaj steloj, ni donas jenan bildon.

La ruĝa flago kun kvin steloj estas marko de la socialisma Ĉinio. Ĝi por eterne flirtas super Ĉinio.

Pri la ĉinaj emblemo kaj himno ni konigos en la venontaj numeroj de nia gazeto.

(Daŭrigo de p. 24)

Ĉar mi ankoraŭ lernas multe ne nur pri Ĉinio aŭ tutmonda Esperanto Movado, sed ankaŭ la Lingvon Internacian mem.

Estas bedaŭrinde ke iuj esperantistoj, kiuj nur foliumis ĝin eble antaŭ multaj jaroj, opinias ke ĝi estas nur propagandilo ĉina. Je mia surprizo, kiel mirinde, unu el niaj malnovaj esperantistoj ŝanĝis sian miskomprenon pri EPC, post momento kiam mi montris al li mian 300-an numeron!

Vere la laborantoj en la redakcio de la gazeto EPC lertiĝas kun ĉia eldoniĝo de sia gazeto por produkti ĉiufoje iom plibonigitan ol sian antaŭan numeron kaj ili certe indas nian kunlaboron.

D. B. JESUDASON (Srilanko)



Sceno el «La Edziĝo de Figaro»

YANG LING:

FREMDLANDAJ OPEROJ SUR LA

EN la lastaj jaroj pli kaj pli multe da fremdlandaj dramoj kaj operoj estis prezentataj sur la ĉina scenejo. Ili estas verkoj de dramistoj kaj komponistoj de Britio, Norvegio, Rusio, Aŭstrio, Francio, Italio, Svisio, Hindio, Japanio kaj aliaj landoj.

Fremdlandaj eminentaj klasikaj dramoj estas multe atentataj de ĉinaj dramistoj kaj konsistigas trionon de la fremdlandaj dramoj prezentitaj en Ĉinio en la lastaj jaroj. Tiuj klasikaĵoj kun nemalmulta profunda edifo nun ankoraŭ havas aktualan signifon, kaj ilia arta tekniko ankoraŭ estas lerninda.

La Ĉina Dramista Asocio montris, ke tiuj prezentitaj dramoj plejparte ne estas originaj formoj sed adaptaĵoj kaj rekreaĵoj, pli konformaj al realaj kondiĉoj de Ĉinio kaj samtempe konservas la originalan spiriton. Ekzemple, la fama dramo de norvega verkisto H. J. Ibsen "Peer

Gynt" prezentita de gestudentoj de la Centra Drama Instituto en majo de 1983 estis mallongigita. La originalo kun 5 aktoj el 38 scenoj daŭras 7-8 horojn, dum la nuna adaptaĵo kun 5 aktoj el 21 scenoj tri kaj duonan horojn.

La dramo rakontas pri la tuta vivo de Peer Gynt, kiu sonĝis pri imperiestriĝo. Ĝi instruas al ni la moralan filozofion, kiel devas kondukti la homo. La dramo estis tradukita de ĉina fama verkisto Xiao Qian el la angla lingvo en la ĉinan en 1981. Lia traduko en proza formo ricevis laŭdojn de multaj fakuloj. Post kiam la tradukinto rigardis la premieron de tiu dramo, li diris kortuŝite: "En 1942, kiam mi rigardis tiun dramon en teatro en la centro de Londono, mi pensis, ke estus bone, se la ĉinoj povus rigardi ĝin! Kompreneble, tiam tio estis nur revo. Sed nun, post duonjara provludado oni fine surscenigis ĝin. Tio

markas, ke Ĉinio akiris plian sukceson en praktikado de la politiko 'Kune floru cent floroj kaj voĉojn donu cent skoloj'. Nun realiĝis mia sonĝo antaŭ 41 jaroj." Li diris plie: "La dramo estas provludita kaj prezentita sub la malfacilaj kondiĉoj, ke la reĝisoroj, scenejaj projektistoj kaj geaktoroj ne vidis alilandan prezentadon, nek rigardis koncernajn filmojn. Ili dependis nur de sia komprenado pri la dramo kaj malmultaj referencaj materialoj."


"Otelo" ludita de la Eksperimenta Pekin-opera Trupo de Pekino en la lasta majo estis alia sukceso en adaptado de famaj fremdlandaj dramoj. La adaptintoj estas du instruistoj de la verka kaj reĝisora fakultato de la Ĉina Opera Instituto. La originala dramo havas 5 aktojn el 15 scenoj, sed la adaptita en pekinoperon nur unu preludon kaj 7 scenojn, kies prezentado daŭras nur pli ol du horojn. La herooj sur la scenejo parolas recitative en prozo. Pli ol 30 kantpecoj en la opero estas rekreataj parte laŭ la libera poemo de Ŝekspiro kaj parte laŭ la pekin-opera melodio. La adaptintoj diris: "En la adaptado la plej granda malfacilo estis kiel krei novan strukturon kaj kantotekstojn por la opero, ĉar oni devas konformigi

DRAMOJ KAJ ĈINA SCENEJO

la adaptaĵon al la formo de pekin-opero kaj al la originalo.”

Otelo en pekin-opero havas brune ŝminkitan vizaĝon kaj portas mezepokan eŭropan veston tamen kun broditaj desegnoj laŭ la tradicia pekin-opera vesto. Krome li portas ŝuojn kutime portatajn de roluloj en pekin-opero. La aliaj herooj havas ankaŭ ŝminkitan vizaĝon laŭ la stilo de pekin-opero. Iliaj vestoj estas faritaj laŭ la stiloj eŭropa kaj pekin-opera en kombino. En la opero sin trovas kaj kanto kaj danco.

La prezento de tiu opero ricevis bonan akcepton de fakuloj kaj spektantoj. Rigardinte ĝian premieron, Cao Yu, la prezidanto de la Ĉina Societo por Studo pri Ŝekspiro kaj la Ĉina Dramista Asocio, diris, ke la gusto kaj la spirito montritaj en la opero estas ŝekspiraj, la scenejaj arto



Sceno el «Buĉisto»

kaj muziko ĉin-stilaj kaj la vestoj lerte kunteksitaj per la eŭropa kaj pekin-opera.

Krom klasikaj dramoj, ankaŭ modernaj fremdlandaj dramoj multe interesas la ĉinajn dramistojn. En 1982 kaj 1983 oni prezentis ok modernajn fremdlandajn dramojn en urboj de Ĉinio. La dramoj havas ne nur grandan realan signifon, sed ankaŭ novan formon. En majo pasintjare, la Pekina Popola Arta Teatro prezentis la usonan modernan faman dramon “Morto de Vendis-

to”, unu el la fremdlandaj teatraĵoj ŝatataj de ĉinoj.

La dramo, kiu prenas la kvardekajn jarojn kiel sian fonon, priskribas 24-horan vivon de vendisto Willy Loman. Dank’ al liaj rememoro kaj iluzio, la dramo spegulas kontraŭdirojn de la usona socio.

Tiu dramo estis tradukita de ĉina fama aktoro Ying Ruocheng, kiu ludas la rolon de W. Loman. Li diris: “Mi klopodas nur por transplanti tiun okcidentan fa-

Sceno el «Morto de Vendisto» ludata de la Pekina Popola Arta Teatro



Sceno el «Sinjorino Papilio»





Sceno el «La Vizito»

man dramon sur la fekundan grundon de Ĉinio.” En modlado de la heroo, li nemulte atentis lian eksteraĵon, sed klopodis krei lian karakteron — la internan koron kaj la spiritan mondon de la heroo. Li sukcese tradukis novjorkajn dialektojn de la dramo en pekinajn dialektojn, kio faris la dramon pli facile komprenebla por la ĉinaj rigardantoj.

Tiu dramo estas reĝisorita de ĝia aŭtoro Arthur Miller, fama usona verkisto. Rigardinte ĝian premieron, li emocie stariĝis el inter la spektantoj kaj kun lar-

moj en la okuloj diris: “Mi dankas la ĉinan operon kun mil-jara tradicio, dankas la ĉinajn geaktorojn kaj spektantojn.” Li tre kontentas je la traduko kaj diris: “El la mieno de la rigardantoj mi vidis, ke la tradukaĵo plene esprimis ne nur la originalon, sed ankaŭ la ritmon de ĝia drama lingvo kaj la karakteron de la herooj.”

Inter la influaj fremdlandaj dramoj prezentataj sur la ĉina scenejo troviĝas ankaŭ “La Tempo de Ĉerizoj” de franca verkisto Jules Valles, kiu spegu-

las la batalan vivon de la Pariza Komunumo, la dramo “La Vizito” de svisa verkisto Friedrich Durrenmatt, kiu priskribas, ke iu virino riĉiĝis kaj faras venĝon kontraŭ sia persekutinto, kaj la dramo “Buĉisto” (Der Bockerer) de aŭstraj verkistoj Pet Plises kaj Ulrics Becher, kiu rakontas la tragedian vivon de la viena loĝantaro dum la Dua Mondmilito. Lastatempe en Pekino oni prezentas “Sinjorino Papilio” de Puccini, itala opera komponisto.

Okcidentanoj kutime havas tian impreson, ke la nivelo de la ĉina opero estas malpli alta. Tamen, la prezento de la opero “La Edziĝo de Figaro” de aŭstra komponisto Mozarto, farita de studentoj de la opera fakultato de la Centra Konservatorio de Ĉinio, mirigis s-ron Clans Moser, la direktoron de la Brita Reĝa Opera Domo, vizitantan Pekinon tiutempe. Ĝi estas rigardata kiel la kulmino de la okcidentaj operoj, ĉar ĝi postulas de geaktoroj altan prezentan arton. Li diris: “Mi ne atendas, ke en Pekino oni povas prezenti ankaŭ Mozartaĵon, via ludo plilarĝigis mian vidkampon.”

Profesoro Jiang Ying, estro de la opera fakultato de tiu konservatorio, diris, ke tio estas la unuafoja prezento de la opero en la ĉina lingvo. Oni forstrekis iujn bagatelajn intrigojn en la opero, reverkis iujn malevidentajn rakontajn melodiojn en recitativojn kaj mallongigis la prezentan tempon je duonhoron. Li diris plie, ke tia mallongigo ne influas la integrecon kaj stilon de la originala muziko.

En la provludado Martine Jsepp, brita specialisto pri la verkoj de Mozarto, venis al Pekino kaj donis dektagan helpon al la geaktoroj.

NOVAJ KOLORAJ INFANLIBROJ

eldonitaj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

MALATENTEMA VIRINO

Iun nokton malatentema virino vidis en sonĝo sian patrinon malsana. Vekiĝinte ŝi kun sia bebo en la brakoj tuj kuris al la vilaĝo de sia patrino. Tie ŝi trovis, ke ŝia patrino estas sana, sed ŝia bebo fariĝis vakskukurbo. Do kio okazis al ŝi?

88-Es-197P 182×206mm. 24 pĝ. £0,50 US\$0,95

KIEL KOVI

Kukolino baldaŭ demetos ovojn, sed ne scias kiel kovi ilin. Vidu, kiamaniere ŝi solvis la problemon.

88-Es-196P 182×170mm. 24 pĝ. £0,50 US\$0,95

ORA HAKILO

Knabo, revenante de kolektado de brulligno, faligis sian hakilon en riveron pro malatento. Iu maljunulo elakvigis por li oran hakilon. Li rifuzis kaj preferis sian feran. Tion aŭdinte lia avara frato volis havigi al si la oran hakilon. Ĉu li sukcesis?

88-Es-195P 175×256mm. 30 pĝ. £0,65 US\$1,30

Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Perantoj de EPC

aŭ Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca
Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P. O.
Kesto 313, Beijing, Ĉinio



ATENTU

La Esperanta Sekcio de CENTRO DE ĈINAJ ELDO-
NAĴOJ (GUOJI SHUDIAN) jam en la pasinta decembro
ŝanĝis sian nomon.

Nun ĝi nomiĝas:

Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio
(GUOJI SHUDIAN)

Esperanta Sekcio

kaj ĝia adreso daŭre estas: P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

第二课 Dua Leciono

I. Vortoj

han-lingvo	han-lingva fonetika alfabeto	Esperanto
早上	zǎoshàng	maten-
请	qǐng	bonvol-
坐	zuò	sid-
喝	hē	trink-
茶	chá	te-

2. Teksto

han-lingvo	A: “早上好!”	B: “早上好!” ①
HFA	A: “Zǎoshàng hǎo!”	B: “Zǎoshàng hǎo!”
laŭvorta traduko	A: maten- bon-	B: maten- bon-
Esp-a traduko	A: “Bonan matenon!”	B: “Bonan matenon!”
han-lingvo	A: “请坐!”	B: “谢谢!”
HFA	A: “Qǐng zuò!”	B: “Xièxiè!”
laŭvorta traduko	A: bonvol- sid-	B: dank-
Esp-a traduko	A: “Bonvolu sidiĝi!”	B: “Dankon!”
han-lingvo	A: “请喝茶!”	B: “谢谢你!” ②
HFA	A: “Qǐng hē chá!”	B: “Xièxiè nǐ!”
laŭvorta traduko	A: bonvol- trink- te-	B: dank- vi
Esp-a traduko	A: “Bonvolu trinki teon!”	B: “Dankon al vi!”

Klarigoj:

①Salutvortoj en matena intervidiĝo. En tia okazo, oni povas ankaŭ reciproki “你好!” (“Saluton!”).

②Por esprimi dankon oni povas diri “谢谢!” kaj ankaŭ “谢谢你!” Aliajn dirmanierojn pri tio vi trovos en venontaj lecionoj.

NOVA GAZETO EN
ESPERANTUJO—NOVA VOĈO

VOĈO DE
HANDIKAPULOJ

Aperas 6-foje en la jaro. Ofsete presata. Luksa papero. Grafike moderna aranĝo. Enhave riĉa. Kunlaborantoj tra la tuta mondo!

Redaktas:

Dušan Adnadj kaj Vujadin Lukić

Jen aŭdu nian VOĈOn! VOĈO ne lamentas, ĝi: diskutas, rekomendas, provokas, malkovras, polemikas, helpas, proponas, rakontas, recenzas, konsilas, komentas, argumentas kaj movadumas.

Nia VOĈO estas io nova—VOĈO por ĉiuj—tio estas via VOĈO

Jarabono: 12.-DM, 5 US\$ aŭ egalvaloro. Jarabonon bonvolu direkti per poŝtenpagilo al adreso: “Voĉo” 56227-Borovo, Ŝkolska ul. 25, Jugoslavio. Al sama adreso estas bonvenaj viaj kontribuajoj kaj informoj.

3. Strekoj kaj strekordoj de ĉinaj ideografiaĵoj

nomo de strekoj	strekoj	direkto de strekoj	ekzemploj
dian (点)	丶	↘	请
heng (横)	一	→	上
shu (竖)	丨	↓	下
pie (撇)	丿	↙	好
na (捺)	㇇	↘	欢
ti (提)	丨	↗	ekzemplon ni donos en postaj lecionoj
henggou (横钩)	フ	㇇	你
shugou (竖钩)	冫	㇇	你
xiegou (斜钩)	㇇	↗	ekzemplon ni donos en postaj lecionoj
hengzhe (横折)	𠃍	↘	喝
shuzhe (竖折)	㇇	↘	喝

reguloj de strekordo	ekzemploj
unue "héng" kaj poste "shù"	早: en ĝia malsupra parto "十" estas skribita unue "héng" (一) kaj poste "shù" (丨)
unue "piě" kaj poste "nà"	坐: en ĝia "人" estas skribita unue "piě" (丿) kaj poste "nà" (㇇)
de supre malsupren	早: unue la supra parto "日" kaj poste la malsupra "十" 茶: same, unue la "艹" kaj poste la "余"
de maldekstre dekstren	你: unue la "亻" kaj poste la "尔" 好: same, unue la "女" kaj poste la "子"
unue eksteraĵo kaj poste internaĵo	vi povas vidi tiajn ekzemplojn en postaj lecionoj
unue mezparto kaj poste ambaŭflankaj partoj	你: en ĝia "小" estas skribita unue la mezparto "丨" kaj poste la ambaŭflankaj partoj "丿" kaj "㇇"

4. Tabelo de ĉinaj ideografiaĵoj

你	丿 亻 亻 你 你 你 你
好	丨 丨 女 女 好 好 好
欢	丿 又 又 欢 欢 欢
迎	丿 彳 彳 迎 迎 迎 迎
谢	丿 讠 讠 讠 讠 讠 讠 讠 讠 讠 讠 谢 谢 谢
早	丨 口 日 日 旦 早
上	丨 丨 上
请	丿 讠 讠 讠 讠 讠 讠 讠 讠 讠 请 请 请 请
坐	丿 人 人 人 人 人 坐 坐 坐
喝	丨 口 口 口 口 口 口 口 口 喝 喝 喝 喝
茶	一 艹 艹 艹 艹 茶 茶 茶 茶

Plej multaj el la ĉinaj ideografiaĵoj estas multstre- kaj kaj ĉiu el ili havas strekojn meznombre 11-12. Nur tre malmultaj havas malpli ol 5 strekojn. En la komencaj lecionoj ni elektos tiujn kompare simplajn en formo. Sed estas malfacile tute eviti multstrekajn, kiel ekzemple la “谢”, ĉar ili estas uzataj preskaŭ ĉiutage. Estas ne grave se vi ne povas bone skribi tiajn en la komenco. Vi renkontos ilin en postaj lecionoj kaj havos ŝancojn ekzerciĝi ripetfoje.

(Daŭrigo de p. 39)

“Vi. . .” ŝi tute ruĝiĝis de kolero.

“Ĝis revido!” Mi ĵetis la laborveston sur la ŝultron kaj forpaŝis.

La sekvantan tagon, kiam mi venis al mia maŝino, mi rimarkis, ke ĉiuj miaj prilaboraĵoj jam forportiĝis. Jes, amikeco ekzistas kaj mi devas danki ŝin. Vidante, ke ŝi estas akriĝanta torntanĉilon, mi ĝoje alpaŝis por ŝin saluti. Sed ŝi ne volis min atenti kun nebona humoro kaj ruĝetaj okuloj.

Subite ŝi ŝanceliĝis kaj aŭdiĝis akra krio. Ŝia montrofigro tuŝis smirgan radon kaj sangis. Mi ĵetiĝis al ŝi por ŝin detiri kaj ŝaltis la motoron. “Vi, vi ne volas plu vivi! Ĉu smirga rado estas ludilo? Estus miraklo, se vi ne mortus de akcidento pro enkaptiĝo de la torntanĉilo. . .” mi riproĉis kaj bandaĝis la fingron per mia mantuko.

“Ne tiel bruu, ĉu bone?” Ŝi diris kun pala vizaĝo.

Oni ne scias, kiam la laborejestro aperis antaŭ ni kiel fantomo: “Haŭtovundo? Ne gravas. Iru al la fabrika kuracejo.”

“Vi,” la laborejestro insultis min kiam ŝi foriris al la kuracejo, “vi ankoraŭ riproĉas ŝin, lignokapulo! Hieraŭ nokte ŝi riparigis por vi ĉiujn ŝraŭbojn ĝis la dekdua. Ĉu vi indas esti viro? Vi eĉ bezonas ke la knabino riparu por vi la nenormajn prilaboraĵojn, kaj, anstataŭ danki ŝin, vi ŝin riproĉis. Ŝi estas solfilino de siaj maljunaj gepatroj. Ŝi rajtas labori en urbo, sed ŝi meminciante petis permeson veni al nia loko. Sed vi ŝin mokadas. Do restu fraŭlo dum la tuta vivo!”

Ej, kiel stulta mi estas! Mi profunde pentis. . .

Poste? Poste ni enamiĝis unu al la alia. Malmultiĝis miaj acidaj vortoj kaj ŝi kiel kutime min ĉiam atentigas.

Verdire, la knabinoj havas bonan koron, tamen malfacile diveneblan.



Bredo de Musteloj

Fotoj de PENG JIANG kaj LI ZHIZHONG

Mustelo (*Mustela putorius*) havas helflavajn lanu-
gojn kaj nigre-brunajn harojn sur la korpo kaj blan-
kajn harojn sur la vizaĝo kun okuloj ringitaj de nigraj
haroj. Ĝia felo havas altan ekonomian valoron pro
bela densa hararo kaj bona kvalito.

Niaj fotoj montras, kiel Yang Shengbin, kam-
parano de Yongnian-gubernio, Hebei-provinco, kune
kun siaj gefratoj bredas mustelojn. Per tiu okupo ili
ĉiujare enspezas po 3 000 juanojn. Dank' al tio pli
kaj pli boniĝas ilia vivo.

La bredejo starigita de Yang Shengbin kaj liaj gefratoj






Survoje al prezentado

AMATORA ENSEMBLO DE KAMPARANA FAMILIO


En la lastaj jaroj rapide progresis la ĉina agrikulturo, senĉese altiĝis la enspezo de kamparanoj kaj sekve ankaŭ riĉiĝis ilia kultura vivo. Kamparano Liu Jishu de Shifang-gubernio, Sichuan-provinco, organizis amatoran ensemblon el siaj 15 familianoj. Post la laborado ili senpage prezentis lokajn kantojn, dancojn, humurajn dialogojn k.a. en najbaraj vilaĝoj kaj urbetoj kaj rikoltis varmajn laŭdojn.



Musteloj




La 16-jara Yang Xiangrong, lerta en bredado



La juna frato kaj filino de Liu Jishu prezentas memverkitan programeron "La Patro kaj Filino Vizitas Moldan Vilaĝon".



Rigardantoj



Yang Shengbin (dekstre) kaj lia frato esploras la vivon de mustelo.



KONFITAĴO DE NEIJIANG

Fotoj de XIN HUA




Konfitaĵo produktita de la butiko
Quanyuan kun longa historio

La konfitaĵo de Neijiang, Sichuan-provinco, estas farita el diversaj freŝaj fruktoj, legomoj kaj medicinaj plantoj. Ĝi havas multajn specojn kun plaĉaj koloroj kaj bona gusto kaj vendiĝas ankaŭ eksterlande.



Laborejo




Veterana laboristo instruas
al junuloj preparan teknikon
de konfitaĵo

METILERNANTINO

(NOVELO)

Ilustrita de Zhang Songying



ONI diras, ke la koro de knabinoj estas mal-facile divenebla, ho, tion mi jam profunde komprenas el mia sperto.

Nia fabriko kun ĉ. 300 homoj sin trovas en “kavo” ĉirkaŭata de altaj montoj, de kiuj ĝi pres-

kaŭ sufokiĝas. Se oni volas vidi tage la bluan ĉielon, oni nepre devas direkti rekte supren la nazon, kaj tiu “prezuriga” tempo daŭras nur 4-5 horojn kaj en la aliaj horoj oni povas vidi nur sunradiojn enpenetrintajn tra nuboj kaj stelojn.

Kia lokaĉo! Kiu el la tieaj loĝantoj ne volus forflugi de ĝi, se flugilojn ili havus? Tamen ekster ĉies atendo alflugis “fenikso”. Je la unua vido mi pensis, ke ŝi estas junpioniro el lernejo — malgrasa kun maldikaj lipoj kaj viglaj okuloj. La du sulketoj sur ŝiaj lipanguloj iom maltrankviligis min: Tiuj sur la vizaĝo de Mona Lisa markas ĉarman rideton, tamen tiuj sur ŝia vizaĝo obstinecon. La plej okulfrapaj estis la du bantoj sur ŝiaj harligoj. Mi jam haltigis la maŝinon kaj volis forpeli ŝin, kiam la laborejestro ekparolis: “. . . ŝi. . . studentino el mezgrada teknika lernejo, nomata. . .”


“Xiao Hong!” ektintis sonora voĉo.

Mi sencere monie fiksas miajn okulojn sur ŝi kaj pensis en la koro: Kial ŝi, kun tia bona voĉo, ne okupiĝas pri kantado?

“Unue ŝi lernu ĉe vi”. Sin deturnante de mi, la laborejestro diris al ŝi: “O, jes, tiu ĉi estas majstro maljuna Wang. Unue vi konu la laboron ĉe li kaj poste funkciui kiel ekzamenisto.”

“Bone, vi interkonatiĝu.” Forirante li palpebrumis al mi. Mi certe lin ŝminkus per sapoakvo, se li ne estus forglitinta rapide.

“Kiom vi aĝas?” mi demandis kun tirata voĉo, prenante mason da kotonfadenoj por purigi la manojn. La laborejestro jam nomis min “maljuna Wang”, mi kompreneble devas meriti tiun



Laborejestro diris al Xiao Hong: “. . . Tiu ĉi estas majstro maljuna Wang. . .”

titolon, kaj krome mi jam havas servodaŭron de dek jaroj. La plena aĝo mia estas 30 jaroj.

“Dudek du,” denove sonoris la tintilo.

“O?!” Mi uzis ambaŭ demandan kaj ekkrian signojn, ĉar mi ne sciis, kiu estas pli ĝusta.

“Nek maljuna, nek tre juna,” ĉifoje longe daŭris tintado. “Iom malalta, mi tamen laboros ne malpli multe!” Tion dirinte ŝi montris al mi okulblankon kaj ekfosis en mia instrumenta kesto. Mi preskaŭ koleriĝis, sed ŝi jam eltiris el la kesto ĉifitan laborveston kaj forte skuis ĝin, pro kies polvo ni ektusis. Ŝi kuntiris la nazon kaj diris: “Kia fiodoro de ŝvito! Eĉ estas tia majstro en la mondo!” Tion dirante ŝi surmetis per eksvingo la veston sur sian robon kun ruĝaj flor-desegnoj en blanka fono kaj iom ordigis ĝin, murmurante: “Bone ĝi sidas al mi.”

Ŝia konduto stuporigis min. Kiu knabino kuraĝus aĝi antaŭ mi tiel senbride kiel ŝi? Eĉ tiuj, kiuj jam havas infanojn, iom min timas! Sed ŝi. . .

Ŝi trovis ankaŭ ĉifitan ĉapon, forte frapis ĝin kontraŭ la keston kaj metis ĝin sur la kapon. Ĉio ĉi plenumiĝis nur en malpli ol tri minutoj. Malaperis la bantoj kaj restis antaŭ mi homo en komika kostumo.

Post la “tualetto” ŝi kontente klinis sian kapon kvazaŭ provokante al mi aŭ petante miajn opiniojn.

“Hm!” Tiu interjekcio ŝajne plene esprimis mian neesprimeblan penson kaj ŝajne nenion.

“Hm!” kvazaŭ eĥis malproksima monto.

“. . .” Ekster mia atendo la eĥo silentigis min. Antaŭ ol mi elpensis kontraŭrimedon ŝi jam levis feran hokon por forskrapi ferajn defalaĵon en la pleto de mia maŝino.

La tutan antaŭtagmezon ŝi senparole staris ĉe la maŝino, jen transdonante ĉu koŝlosilon aŭ kalibrilon, jen forskrapante defalaĵon. Ĉion ŝi plenumis kun atentemo kaj diligenteco, sed mi ne scias, kiom longe tio daŭros.

Eksonoris signalo por tagmanĝo. Mi haltigis la maŝinon kaj pretis por voki ŝin al manĝejo, tamen ŝi jam malaperis. Kun retenata kolero mi atendis ŝin, kaj kiam mi jam perdis paciencon, ŝi revenis kun du gameloj en la manoj.

“Majstro juna Wang, jen via,” ŝi enmanigis al mi unu el ili.

Kun la manoj krucitaj postdorse mi kategorie deklaris: “Majstro maljuna Wang!”

“Majstro juna Wang!” ŝi pli obstine ripetis.

“Vi. . .”

“Hm!” Ŝi metis la gamelon sur la tablon, kun duonrideto ĵetis al mi rigardon kaj komencis manĝi kun klinita kapo.

Pro kolero mi volis preskaŭ engluti ankaŭ la gamelon. Mi malfermis ĝin — ho, verdaj kapsikoj tre ŝatataj de mi. De kie la bubino informiĝis pri mia gusto?

Posttagmeze ŝi sekvis min kiel ombro. Ŝi ne rigardis min rekte, tamen mi ĉiam sentis ke la paro da okuloj sin direktas al mi de tempo al tempo.

Post la labordeĵoro ŝi metis mian malpuran laborveston sub sian brakon kaj diris: “Pruntu al mi por unu nokto. Ĝis morgaŭ, majstro juna Wang. . .” La bantoj ekfulmis kaj ŝi estis for.

La sekvantan tagon, kiel kutime mi atingis la fabrikon duonhoron antaŭ la tempo. Ĉe la pordo de la laborejo mi jam aŭdis bruon de tornilo. Kiu? Tiel frue. . .

Estis la knabino! Ankaŭ en la prilaborita laborvesto ŝi aspektis bele. Certe furoros la vesto, se niaj knabinoj rimarkos la efekton. Antaŭe ili ne ŝatis la bluzon pro ĝia vasteco kaj griza koloro.

Laŭ la reguloj la maŝino jam estis en malrapida turniĝado; tranĉiloj akritaj kaj bonorde metitaj kaj la maŝino lubrikita.

Sur mia instrumenta kesto kuŝis mia laborvesto lavita, kvadrato faldita, sur kiu estas la ĉapo. Bonodoro estiĝis en la aero kaj mi ŝtele enflaris. Mi ne sciis, ĉu la odoro venas de sapo aŭ de ŝia korpo.

Feliĉe, ke la laborejestro ne venis forkonduki ŝin. Verdire, mi jam ne volis, ke oni forkonduku ŝin. Multaj opinias, ke oni havas pli da energio dum laboro kun alesto de knabino apude. Kiu volas montri sin sentaŭga antaŭ knabinoj? Kaj efektive ŝi laboris neniom malpli bone ol mi.

Ĉiutage ŝi venis al la laborejo pli frue ol mi kaj faris ĉiujn preparojn. Tagmeze ŝi ĉiam helpis min

en aĉetado de tagmanĝaĵo. Post laboro ŝi ĉiam lasis min foriri unua kaj ŝi mem restis por purigi la maŝinon. Min malkontentigis nur tio, ke ŝi ĉiam nomas min “majstro juna Wang” kun gusto nedifinebla.

Foje ŝi helpis min ordigi la instrumentan koston kaj trovis en ĝi rulon da honoraj diplomoj. Ŝiaj okuloj ekbrilis de ĝojo kaj atente legis ĉiun el ili. Ŝi ĵetis al mi nekredan ekrigardon, tion mi tamen intence neglektis.

“Ĉu ĉiuj por vi?”

“Blankaj paperoj kun nigraj literoj. Ĉu ankaŭ tio estas falsebla?”

“Tute ekster mia atendo.”

“Oni ne devas taksi homon laŭ lia aspekto.”

Post longa silentado el ŝia buŝo elsaltis laŭdeto: “Vi ja estas viro!”

“Laŭdo ne meritata! Kia viro mi estas, ke mi ne havas longajn kapharojn, nek portas modajn sunokulvitrojn, nek koloran jakon nek striktan pantalonon, nek scipovas danci!”

“Kian teruraĵon vi diris! Mi malestimas tiujn al kiuj mankas vireco. Viroj devas esti fortikaj kaj viglaj. Se vi ne scipovas danci, mi lernigu vin.”

“Mi ne kapablas!”

“Do tute ne estas mirinde, ke vi ne havas amikinojn.” Ŝi strabis al mi kaj ekridis. “Ĉi-vespere ni iru danci kaj mi instruu al vi. Ĉu vi kuraĝas, brava viro?”

Kiun mi iam timis? Mi faris decidon: “Bone, mi iros!”

Tiuvespere mi venis laŭinvite al la loĝejo por laboristinoj. Apenaŭ mi atingis la pordon, la du bantoj jam aperis el ĝi. Tiam elŝoviĝis el fenestroj multaj kapoj kvazaŭ por eksponi hararanĝojn. Iliaj esploraj kaj akraj rigardoj multe embarasis min.

“Ne zorgu ilin. Ni iru.” Tion dirinte ŝi jam pretis min tiri.

Ĉu ŝi fariĝu mia “kavaliro”? Kun alte levita kapo kaj elstarigita brusto mi enpaŝis en ŝian ĉambron.

Ja estas malmultaj knabinoj, kiuj volas labori en nia loko izolita. Antaŭe venis nombro da ili,

sed en la lastaj jaroj multaj el ili forflugis unu post alia. Tial ĉiu el la restaj okupas unu ĉambron. La ĵus lavita lignoplanko brilis en la lumo, sub la vitrotabulo de ŝia tablo kuŝis kelkaj fotoj. Mi donis apartan esploron por vidi ĉu estas tiu de viro. Ne. Magnetofono sur ŝia lito estas la unika valorajo en tiu ĉambro.

“Nu?” ŝi urĝetis min, starante meze de la ĉambro.

“Kion tio signifas?” mia voĉo iom raŭkiĝis.

“Dancu.”

“Laŭ via plaĉo.” Mi ŝajnis min aplomba. “Zorgu, ke viaj altaj kaj pintaj kalkanumoj ne vundu min, ĉar tia vundo ne estas kalkulata kiel laborakcidento.”

“Sensecaĵo!” Ŝi ŝaltis la diktafonon kaj la ĉambro tuj plenis je la bela muziko de la “Blua Danubo”.

“Kial stari senmove?” ŝi etendis al mi la manojn.

Kion mi faru?

“Manon!” ŝi ordonis, “ĉu vi ne vidis en filmoj?” Ŝi kaptis mian maldekstran manon.

Antaŭ ol mi havis tempon por bone percepti, ŝi jam metis sian manon sur mian ŝultron.

Ho, ĉielo! Kiel mi promesis malgraŭvole lerni de ŝi dancon? Ĉu mi estas taŭga por tion lerni?

“Hm, antaŭe mi opiniis vin vera viro!”

“Alpaŝu!” mi min kuraĝigis en la koro kaj brakumis ŝin je la talio.

Ŝi honteme ekridetis.

“Bone, sekvu miajn paŝojn. Kiam mi retiriĝas, vi antaŭen paŝu kaj kiam mi antaŭen, vi retro. Unu, du, tri. . .”

Mi havis neniom da genio por danci. Kiel hontinde! Ŝi tamen tute ne atentis pri tio kaj serioze daŭrigis sian instruadon.

“Bone. . . Mise, vi denove surtretis mian piedon.” Ŝi mallevis sian kapon por rigardi miajn paŝojn. Ŝiaj nigraj kapharoj tikle tuŝetis mian vizaĝon kaj mi denove flaris tiun bonodoron. . . Jes,odoro sama kiel tiu el la laborvesto.

Apenaŭ mi akordigis miajn paŝojn kun la ŝiaj, ŝiaj vortoj multiĝis.

“Kion vi ankoraŭ scipovas paroli krom sarkasmaj diroj?”

“Pri bravaj vortoj mi ne kapablas.”

“Ĉiuj laŭdas vin pro via laboro. . .”

“Ne aŭskultu al ilia distrumpeto. Mi nur opinias, ke oni devas labori konsciencie. ‘Kiom da pago tiom da laboro’ estas ne mia principo.”

“Vi denove mispaŝas. Kial vi ĉiam surtretas miajn piedojn! Pli firme tenu mian talion! Ĉu mi estas elektrita? Jes, ĝuste tiel. Nun jam sufiĉe bone.” Ŝi daŭrigis: “Kion vi faras vespere?”

“Iri al kinejo, televidi aŭ babili, kelkiam fari pluslaboron, se estas necese.”

“Ĉu vi ne lernas ion?”

“Mi volas lerni fremdan lingvon, sed ne trovas instruiston.”

“Estu mia lernanto. Ankaŭ mi lernas tion. Kaj mi aĉetis magnetofonon ĝuste por tio.”

“Dankon. Mi provu.”

“Sed kondiĉe, ke vi persistos ĝis la fino, kaj ne haltos duonvoje.”

Post pluraj monatoj mi multe kleriĝis, sed ŝi neniom malstreĉis sian postulon al mi. Eĉ mia malgranda neatento rikoltis ŝian mokon:

“Ho, denove vi etendis la flugilojn de imago?”

“Ĉu estas io pripensinda por mi, senzorga solulo?”

“Hm, dupon vi trompas, atente legu!” Sen kapolevi ŝi jam scias ke mi estas rigardanta ŝin.

“Eĉ levi kapon estas nepermesite?”

“Tro multfoje vi levas vian kapon.”

“Ĉu vere? Mi levas la kapon nur post finlego de ĉiu paĝo.”

“Se tiel, do sur ĉiu paĝo troviĝus nur unu vorto!”

“Kiu vorto?”

“Vi mem scias.” Tion dirinte ŝi mallevis sian kapon kaj ekridis.



Li ĵetis la laborveston sur la ŝultron kaj foriris.

Malgraŭ ĉio, kun ŝi kiel metilernanto mi estis feliĉa. Ŝi ĉiam konkure faris laborojn. Eĉ por malfacila prilaboraĵo unufoja demonstrado jam sufiĉis por ŝi. Pri flegado de la maŝino, eĉ la tre ĉikanema laborejestro havis neniun kritikon. La cirkulanta honora flago por bona flegado de maŝinoj pendis super mia maŝino jam plurajn sinsekvajn monatojn. Mi ja revis atingi du grandajn celojn: La unua estas fariĝi avangardulo de la laborejo en produktado kaj la dua . . . tamen eĉ rideto ne videblis sur ŝia vizaĝo dum laborhoroj.

“Ĉu junulo devas fari kiel vi?” Ŝi denove ĵetis al mi oblikvan rigardon, vidinte, ke mi apogis min sur la instrumentan keston kaj langvore rigardis ŝin. “Apenaŭ tridekjara vi jam montras vin tiel malvigla, kiu povas enamiĝi al vi.”

“Tial mi metas mian esperon sur vin.”

Ŝi tamen ne koleris pro mia sugesto. “Kun tia animstato vane vi esperos.” Ŝi haltigis la maŝinon kaj deprenis la cigaredon el inter miaj lipoj.

Rigardante la fumantan cigaredstumpon, mi stuporiĝis. Ŝi ankaŭ elprenis el mia poŝo skato-

lon de cigaredo kaj ĵetis ĝin eksteren tra la fenestro. “La odoraĉo plaĉas al vi, tamen sufokas min.”

Kion mi faru kontraŭ tia homo? Mi devis cedi!

Post sia sukceso en malpermeso de fumado ŝi fariĝis pli senbrida, eĉ ekzorgis pri mia vestado. Se tio okazus en la pasinteco mi certe regalus ŝin per sakraĵoj, sed nun mi obeeme plenumis ĉiun ŝian ordonon.

“Oni babilaĉas pri nia interrilato,” mi provis sondi ŝian koron, kiam mi vespere lernis en ŝia ĉambro.

“Babilas ja vi mem.”

“Ej, vi. . .”

“Nun ne estas tia afero.”

“Venonte?”

“Tio dependas de via konduto.”

“Mia?!”

“Estante junulo, vi intence ŝajnigas vin malvigla; vi aktive laboras efektive, sed ĉiam diras acerbajn vortojn por kaŝi vian veran karakteron. Kion vi timas? Ĉu vi timas mokojn de viaj fratroj? Vi mem elektis por vi apatiajn aspektojn. Mi komprenas vian deprimon: Vi ne havas gepatrojn, nek gefratojn. Vi havas neniun por verŝi al tiu vian koron. Vi abomenas agmanierojn de viaj ‘fratoj’, sed timas ilian mokon, tial vi ŝajnigas vin indiferenta.

“Prezentu atestaĵon!” mi forte surpriziĝis.

“Ekzemple pri mi, mi scias, ke vi amas min, sed vi ĉiam kun malvarma vizaĝo, elĵetas pikajn vortojn por kaŝi vian veran senton. Mi estas homo, ne pensu, ke mi ne komprenas tion.”

“. . .” Mi preskaŭ svenis.

Antaŭ ol mi reakiris la konscion, pli grandan baton donis al mi la laborejestro. Li kun rigida vizaĝo venis al mi kaj diris: “De morgaŭ Xiao Hong laboros kiel kvalito-ekzamenisto. Pri tio tiam ni interkonsentis. Vi, stultulo, nur scias kvereli kun ŝi. Prenu tiun lecionon.” Frapetante min sur la ŝultron, li turnis sin kaj foriris.

“Stultulo vi estas. Ĉion vi fuŝas!” Mi vere volus insulti lin. Sed pro kio mi rajtas ne lasi

ŝin foriri? Kiel mi rajtus diri, ke ŝi apartenas al mi? . . . Iru knabino, ne forgesu min. Ankaŭ ŝi informiĝis pri tio kaj senbrue iris al mi: “Morgaŭ mi ne povos labori ĉe vi. . .”

“Gratulon al vi pro la promocio.”

“Kial moki? Ni ankoraŭ en la sama laborejo kaj mi certe venos al vi ofte.”

“Troa honoro por mi. Nur ne traktu min tro severe.”

“Se temas pri la kvalito de produktaĵoj, vi ne revu. Se temas pri via temperamento mi povas cedi, ĉar vi estas mia majstro.”

En la unua tago kiam ŝi fariĝis ekzamenisto, mi aŭdis mian maŝinon bruanta kiel kutime, kiam mi eniris matene en la laborejon. Kiel bona knabino! Ŝi estis faranta por mi preparadon.

“Via ekzamenista moŝto, mi ne kuraĝas plu vin ĝeni.”

“Ĉu vi ne timas agaci viajn dentojn per tia acidaĵo?”

Tiutage mi sentis kvazaŭ mi perdus ion. Antaŭ finiĝo de la laborhoru ŝi kun mikrometro venis al mi kaj atente mezuris ŝraŭbojn prilaboritajn de mi. “Kiel okazis, ke viaj prilaboraĵoj estas je duondecimilimetro pli dikaj,” ŝi diris kun maltrankvilo.

Kio? Mi haste levis mian mikrometron por mezuri. Senerare! “Apenaŭ vi fariĝis ekzamenisto, vi jam tenas vian nazon supren kaj eĉ mikrometron ne povas ĝuste uzi!”

“Ne tenu vin kiel bravulo, via mikrometro ne estas korekta.”

Ŝi diris prave. “Sed vi kulpas en tio,” mi plendis en la koro, “ĉu povus esti tia eraro sen via ĝeno?” “Neniom gravas la duondecimilimetra ekarto, estu indulgema,” mi petis.

“Ne, riparu ilin,” ŝi postulis kategorie.

“Ne estu tiel rigida.”

“Do por kio necesas desegnaĵo?”

“Mi ne riparos.” “Pum!” mi forte fermis la instrumentan keston por foriri.


(Daŭrigo sur p. 34)




POR VIA SANO

SANIGA LUKTARTA ĈIGONG-O

de YANG PINGXING



bildo 1



bildo 2

Post kiam nia gazeto aperigis la artikolon "Spira Gimnastiko kaj Ĝia Saniga Efiko" en la n-ro 6 de 1981, Zygmunt Stachurski de Pollando kaj aliaj legantoj skribis al ni, ke ni faru pli detalan raportadon pri tiu gimnastiko kaj ĝia ekzerco. La jena artikolo prezentos al vi kiel sin ekzerco per la gimnastiko.

— La Red.

LA ĉina lukarta ĉigong-o* havas longan historion. Post longa praktikado ĝi jam evoluis en efikan sanigan rimedon. Ĝi povas akceli la ĉi*-an kaj sangan cirkuladon, fortigi la korpon kaj forigi malfacile kuraceblajn malsanojn per krioj, piedbatoj, movoj fortaj kaj mildaj, senmovo, kuntiriĝo, etendo, leviĝo kaj malleviĝo. Ĉi tie ni prezentas al vi

sep simplajn kaj facile lerneblajn ekzercojn de ĉigong-o. La ekzercojn faru matene kaj vespere. Vi povas fari ĉiujn ekzercojn kune por sanigi la tutan korpon aŭ elekti iujn el ili laŭ malsano, ekz. paciento de lumba kaj gamba doloro povas elekti por si la unuan, neŭrastenia kaj sendorma suferanto la sesan.

bildo 3



bildo 4



bildo 5



Tiu ĉi ĉigong-a ekzercaro estis disvastigata en Ŝanhajo kaj aliaj lokoj, kaj multaj suferantoj de artrito, neŭrastenio, sendormeco, lumba kaj gamba doloro, hepatito en resaniĝo, kapturiniĝo, kronika enterito, memorpova malfortiĝo, sangurino, hipertensio kaj aliaj kronikaj malsanoj estis resanigitaj aŭ akiris evidentan efikon post ĉigong-a ekzercado. Ĝi estas taŭga ne nur por maljunuloj kaj malsanemuloj, sed ankaŭ por junuloj kaj sanaj homoj por fortigi la korpon kaj preventi malsanon.

UNUA EKZERCO

Komenca pozo: Rekta staro kun la manoj ĉe la koksoj, la dekstra pugnigita kaj la maldekstra ne.

Farado:

1. Levi la pugnon kaj manplaton ĝis la talio, iom fleksante la kubutojn, kaj rapide etendi ilin antaŭen, samtempe movi la maldekstran piedon antaŭen je unu paŝo kaj fleksi la genuon (bildo 1).

2. Movi la dekstran piedon apud la maldekstran, stari sur la piedpintoj, samtempe retiri la

kubutojn al la flankoj de la brusto kaj fleksi la genuojn tiel ke ili ne antaŭu la piedpintojn (bildo 2).

3. Malrapide etendi kun forto la maldekstran manplaton antaŭen-supren, samtempe platigi la dekstran manon kaj malrapide etendi posten-malsupren kaj la dekstran gambon posten (sen tuŝi la teron) kun forto. Rektigi la maldekstran gambon (bildo 3) kaj teni la pozon ĝis apero de acid-ŝvela sento ĉe la lumbo kaj dorso.

4. Surterigi la dekstran piedon kaj fleksi la maldekstran gambon.

5. Sin turni dekstren-posten je 180 gradoj, movi la dekstran manplaton kun la polmo al maldekstro apud la dekstran femuron kaj la maldekstran manplaton apud la dekstran makzelon kaj fleksi la dekstran gambon (bildo 4).

6. Movi la maldekstran piedon apud la dekstran kaj stari kun ĝi sur la piedpinto (bildo 5).

7. Levi la dekstran manplaton preter la dekstra makzelo kaj malrapide etendi ĝin antaŭen-

supren kun forto, samtempe movi la maldekstran manplaton apud la maldekstran femuron kaj malrapide etendi la maldekstran piedon (sen tuŝi la teron) posten-malsupren kun forto. Rektigi la dekstran gambon (la movoj estas la samaj kiel tiuj de 3, sed en inversa direkto).

8. Mallevi la maldekstran piedon surteren kaj fleksi la dekstran gambon. Se la ekzercanto volas plu sin ekzerci, li povas sin turni maldekstren-posten je 180 gradoj kaj ripeti la suprajn movojn je 5-8 fojoj (inverse).

Rimarkigoj:

1. Malrapide fari la movojn de 3-7 kun forto, tiel ke acid-ŝvela sento aperu sur la lumbo kaj dorso.

2. Spiri nature.

Efiko: Vigligi la sangan cirkuladon, ĉefe por kuraci kronikan lumban kaj gamban doloron.


DUA EKZERCO

Komenca pozo: Rekta staro.

Farado:

1. Levi ambaŭ manplatojn kun la mandorsoj al-ekstere kaj


bildo 6




bildo 7




bildo 8






bildo 9



bildo 10



bildo 11

kun la fingroj nature malstreĉitaj de flanko antaŭen ĝis la brusto kaj iom fleksi la kubutojn, samtempe enspiri plene por ŝveligi la subventron, levi la dekstran femuron horizontale, fleksi la genuon kaj nature pendigi la kruron (bildo 6).

2. Malstreĉi la tutan korpon, forte kaj rapide mallevi la manplatojn, forte piedbati teron per la dekstra piedo, samtempe laŭte krii "Hej" kaj nature iom levi la maldekstran piedpinton (bildo 7).

3. Movi la maldekstran piedon antaŭen je unu paŝo kaj fleksi ĝin, samtempe forte movi la manplatojn antaŭen (bildo 8).

4. movi la dekstran piedon apud la maldekstran, rekte stari sur la piedoj disigitaj tiom, kiom la ŝultroj etendiĝas, kaj nature mallevi la manojn.

Rimarkigoj:

1. Dum la piedbato, oni devas uzi la tutan plandon, nepre ne nur la kalkanon.

2. Krii laŭte, rapide kaj forte.

Efiko: Fortigi la renojn, sanigi la korpon kaj vigligi la spiriton, ĉefe por kuraci neŭrastenion.

TRIA EKZERCO

Komenca pozo: La fina pozo de la dua ekzerco.

Farado:

1. Malrapide levi la manplatojn ĝis la brusto kun la polmoj al-antaŭe kaj samtempe enspiri plene (bildo 9).

2. Turni la polmojn malsupren, malrapide mallevi manojn ĝis la kokso-flankoj (kun la polmoj al-malantaŭe), mallevi la torson kaj iom fleksi la genuojn en rajdpozo (bildo 10).

3. Turni la polmojn supren, levi la torson, rektigi la gambojn kaj levi la manojn ĝis la brusto.

4. Malrapide mallevi la manojn kun la polmoj unu kontraŭ la alia ĝis la flankoj de la korpo, fleksi la genuojn tiel ke ili ne antaŭu la piedpintojn kaj fermeti la okulojn. Koncentri la penson pri vidaĵo en la ĉirkaŭaĵo, meti la graviton de la tuta korpo sur la akupunktura punkto *Jongĉjuan* en la mezo de la antaŭa parto de la plandoj (bildo 11) kaj teni la pozon ĉ. 20 minutojn.

Rimarkigoj:

1. Spiri nature, movi milde kaj malstreĉi la tutan korpon.

2. Dum la starado ne rigardi per la okuloj kaj nature fleksiti la fingrojn. Absorbiĝi kaj teni bonhumoron.

Efiko: Vigligi la sangan kaj ĝingluo**-an cirkuladon, ĉefe por kuraci hipertension, kaptur-niĝon, vidmalklarecon kaj kronikan enteriton.

KVARA EKZERCO

Komenca pozo: Nature stari sur la piedoj disigitaj iom malpli larĝe ol la larĝeco de la ŝultroj.


Farado:

1. Movi la maldekstran piedon antaŭen je duona paŝo kaj malrapide levi la manojn kun polmoj unu kontraŭ la alia ĝis la alteco de ventro (bildo 12).

2. Turni la torson dekstren je 90 gradoj, samtempe turni la polmojn malsupren kaj retiri la dekstran manon ĝis la supra abdomeno (bildo 13).

3. Mallevi la torson kun la manoj kaj horizontaligi la maldekstran femuron, klini la ŝultrojn iom antaŭen, malrapide plen-enspiri kaj iom fleksi la dek fingrojn kun forto en formo de aglaj ungoj (bildo 14).


4. Forte sin levi kun la manoj kaj samtempe elspiri malrapide, rektigi la dekstran gambon



bildo 12



bildo 13



bildo 14

kaj iom levi la maldekstran kalkanon (bildo 15).

5. Repreni la komencan pozon.

Ripetante la ekzercon, oni devas fari la movojn en inversa direkto kaj unue movi la dekstran piedon.

Rimarkigoj:

1. Fleksi la dek fingrojn forte kiel aglaj ungoj tenantaj pezan objekton.

2. Farante la movojn 4, oni devas streĉi la muskolojn de la tuta korpo.

Efiko: Fortigi la renojn, la fingrojn, kalkanojn kaj la kvar membrojn, sanigi la korpon, vigligi la sang-cirkuladon, ĉefe por kuraci artriton de la membroj.

KVINA EKZERCO

Komenca pozo: Rekta staro.

Farado:

1. Movi la maldekstran piedon maldekstren tiom larĝe, kiom la ŝultroj estas, levi la manojn horizontalaj kun la polmoj al-malsupre (bildo 16).

2. Enspiri ĝis plensveliĝo de la subventro, etendi la du pojn al-malsupren kun forto kaj

samtempe suprenlevi la fingrojn kun forto. Poste malrapide elspiri kaj malstreĉiĝi. La movo ripetebla.

Rimarkigoj:

Dum la ekzercado oni devas senti acid-ŝvelon en la antaŭbrakoj, sed ne kaptturniĝon.

Efiko: Fortigi la muskolojn de la supraj membroj, ĉefe por kuraci artriton de la supraj membroj.

SESA EKZERCO

Komenca pozo: Rekta staro.

Farado:

1. Movi la dekstran piedon antaŭen je unu paŝo, fleksi ĝin, rapide levi la dekstran manon antaŭen super la kapon, movi la maldekstran manon apud la dekstran femuron kun la polmo al-malsupre kaj la fingroj al-antaŭe (bildo 17).

2. Levi la maldekstran manon kun la polmo al-dekstre laŭ la dekstra antaŭbrako ĝis inter la dikfingro kaj la montrofingro, movi la maldekstran piedon apud la dekstran piedon (bildo 18).

3. Movi la maldekstran piedon antaŭen je unu paŝo kaj

fleksi ĝin, samtempe turni la polmojn antaŭen, subite premi al-supren per la maldekstra manplato ĝis super la maldekstra genuo je 3 cm., subite retiri la dekstran manplaton ĝis sub la umbiliko kaj turni la torson dekstren je 90 gradoj (bildo 19).

4. Plene enspiri kaj movi la dekstran manon ĝis super la umbiliko.

5. Kiam ŝvela sento venas al la subventro, forte premi al-supren per la dekstra mano kaj samtempe laŭte krii "Hej".

Rimarkigoj:

1. Dum la farado de la movoj 3 la montrofingroj de la manoj unu post la alia estu sur sama linio kaj la ŝultroj iom kliniĝu antaŭen.

2. Kriante la ekzercanto devas montri kolerajn okulojn kaj levi la brovojn.

Efiko: Vigligi la spiriton kaj akceli la apetiton, ĉefe por kuraci neŭrastenion, sendormon kaj kronikan bronkiton.

SEPA EKZERCO


Komenca pozo: Rekta staro.

Farado:


1. Movi la maldekstran piedon maldekstren iom malpli lar-



bildo 15



bildo 16



bildo 17

ĝe ol la larĝeco de la ŝultroj, pugnigi la manojn kun la pugnaj truoj al-antaŭe.

2. Enspiri kaj samtempe levi la kalkanojn, retiri la bruston kaj elstarigi la dorson (bildo 20).

3. Plifirmigi la pugnojn, haltigi la spiron, levi per interna forto koncentran konscion de la talia akupunktura punkto *Ming-men* (je la dua lumba vertebro) al la verta akupunktura punkto *Bajhuj* (meze de la verto inter la oreloj) laŭ la spino.

4. Kiam la ekzercanto sentas kap-ŝvelon, li devas malstreĉi la tutan korpon, malrapide surterigi la kalkanojn kaj samtempe elspiri, dume koncentre konscii la

akupunkturajn punktojn *Dantian* (3 cm. malsupre de la umbiliko).

Rimarkigoj:

1. Dum levado de la konscio, nepre haltigi la spiron.

2. Ne kaŭzi laciĝon.


Efiko: Sanigi la cerbon kaj la okulojn kaj vigligi la ĝingluo**on, ĉefe por kuraci hipertension, kapturiniĝon, duonkapan doloron kaj vid-malklarecon.

* *Ĉigong*-o: Oni nomas la spiron kaj la fizikan povon en homa korpo *ĉi*, kiu estas rigardata kiel movforto de homa vivo; la lertecon kaj la homkorpan hardiĝon ricevitajn en longdaŭra ekzercado oni nomas


gong. *Ĉi-gong*-o estas korpo-ekzerca metodo por kuraci malsanojn kaj fortigi la korpon kaj spiriton. Dum *ĉigong*-ekzercado oni devas koncentri sian atenton samtempe al spirito, korpo kaj spiro.

** *Ĝingluo*-o estas termino en ĉina medicino. La ĉin-medicinistoj opinias, ke en la homa korpo troviĝas interkruciĝaj vertikalaj *ĝing* kaj horizontalaj *luo*, kiuj estas nomataj per *ĝing-luo*. La *ĝingluo*-oj estas kondukiloj por cirkuligi la *ĉi*-on kaj sangon de la tuta korpo, kunligi kaj reguligi la internajn organojn kaj diversajn korpopartojn. La kontaktiĝo de la *ĝingluo*-a sistemo faras la homan korpon organika tuto.


bildo 18



bildo 19



bildo 20



Mi dediĉis mian amon al infanoj

de ZHOU XIUYING

Ŝi estas amema patrino, sed ne havas tempon zorgi pri sia hejmo. Ŝi, instruistino de elementa lernejo, dediĉis sian amon al pli multaj infanoj. Dum 23 jaroj ŝi diligente laboris kaj elkulturis aron kaj aron da lernantoj, kiuj poste fariĝis homoj utilaj al la socio.

— La Red.

ONI metafore nomas instruiston diligenta ĝardenisto. Kiel ordinara instruistino de elementa lernejo, mi pensas, ke mia laboro estas glora, kaj des pli ke ne estas facile fariĝi kompetenta “ĝardenisto”.

Fininte la studon en supera mezlernejo, mi eklaboris kiel instruistino en la 16-a Elementa Lernejo de Yinchuan en la Ningxia-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono. Vidante en la lernejo navajn kaj viglajn infanojn kun ridantaj amindaj vizaĝoj, mi sentis min kvazaŭ en ĝardeno. Mi amis ilin, mi diris al mi: “Mi devas fariĝi kompetenta ‘ĝardenisto’”.

De tiam mi senlace laboris de mateno ĝis vespero, tamen tio ne rikoltis bonan efikon. Retrorigardante mian laboron, mi trovis, ke mi neglektis komprenpovon de lernantoj dum mia preparado de lecionoj kaj en lekciado mi ne povis uzi simplajn kaj facile kompreneblajn vortojn. Por solvi tiun problemon, mi energie lernis kaj posedis infanan lingvon kaj serĉis taŭgan instrume-

todon. Rakonto povas altiri la atenton de infanoj, mi do adaptis ĉiun pecon da teksto al rakonteto. Analizante tekston, mi aplikis edifon kaj komparon, por ke la infanoj komprenu kaj posedu ĝiajn ĉefajn vortojn, frazojn kaj paragrafojn. Mi figure instruis ilin per kortuŝaj materialoj por influi ilin en lingva medio.

Mi donis grandan atenton al studo de infana psikologio. Mi trovis, ke se instruisto elmetis novan programon tuj post ko-

menco de leciono, lia instruado ne bone efikis. Ĉar la infanoj ĵus finis sian postkursan aktivadon, ili ankoraŭ ne povis absorbiĝi, tial antaŭ ol doni novan lecionon, mi ripetis iliajn poseditajn sciojn. Dum ilia pripensado mi nature eldiris la enhavon de nova teksto. Krome, la elementlernejoj ne povas ĉiam koncentri sian atenton dum la tuta leciono (40 minutoj), tial en ĉiu lernohoro mi sen interrompo tenis ilian atenton per novaj scioj.

La efikon de leciono influas lecion-preparado. Por bone prepari lecionojn, mi promenis en mia korto kaj teksis instruan planon. Nur post tio mi skribis programon, tial mi ofte laboris ĝis profunda nokto. Ĉar mi plibonigis la instruadon, la lernantoj ŝatis mian prelegon. Iam oni sonoris la finiĝon de leciono, ili bedaŭris: “Aĥ, kiel rapide pasis la leciono!”

Konkuras la infanoj en lernado. Ili esperas, ke post sia lernado en elementa lernejo ili sukcese trapasos eniran ekzamenon por ĉefa mezlernejo kun bonaj instalaĵoj kaj kompetentaj instruistoj. Tia konkuro fariĝis des pli intensa en pli altaj klasoj.

Zhou Xiuying kaj infanoj en provludado



Ni instruistoj instigis kaj energie helpis la infanojn akiri la plej altajn notojn de lernado, por ke ili havu solidan fundamenton por sia estonta lernado en mezlernejo. La lernejo permesis al la malsukcesintoj en diplomiĝa ekzameno resti ankoraŭ unu jaron en la klaso.

Mi iam instruis lernantojn kun malaltaj notoj. En la unua tago de la kurso mi ekzamenis ilin sondcele. El ili la plej bona ricevis nur 48 poentojn (laŭ centezimala sistemo). La sekvantan tagon mi eniris en la klasĉambron kaj vidis ilin ĉiujn silentaj kun mallevita kapo, kaj mia nazo spasmiĝis de tio. Anstataŭ riproĉi, mi konsolis ilin: “Infanoj, levu viajn kapojn kaj ne deprimiĝu! Se vi diligentos, vi povos trapasi eniran ekzamenon.” De tiam mi elspezis preskaŭ mian tutan libertempon por helpi ilin relerni la ĉinan lingvon kaj aritmetikon. Poste ili multe progresis kaj sukcesis trapasi eniran ekzamenon por mezlernejo. 5 el ili ekvizitis eĉ ĉefan mezlernejon.

Okupiteco, terura okupiteco. Al tio ni instruistoj jam kutimiĝis kaj neniu havas plendojn. Ni komprenis, ke oni devas kulturi kapablulojn de ilia infaneco. Multjare mi funkciis kiel ĉefinstruistino. Mi iris al la lernejo je la duono post la sepa por gvidi la lernantojn en ilia matena legado. En postlecionaj horoj mi preparis lecionojn kune kun aliaj instruistoj aŭ donis helpon al lernantoj, kiuj lernis malfacile, aŭ vizitis la familiojn de iuj el miaj instruatoj. Mi faris decidon, ke ĉiun semestron mi vizitu la familiojn de miaj lernantoj po unufoje kaj havu konstantan kontakton kun la gepatroj de maldiligentaj kaj sendisciplinaj

Zhou Xiuying kaj infanoj sur ŝipo



lernantoj. En la klaso troviĝis saĝa kaj agema lernanto nomata Cui Yang, kiu lernis bone. Sed poste li subite malprogresis, eĉ kelkfoje li ne trapasis ekzamenojn kaj forestis de lecionoj senkaŭze. Vizitante lian familion, mi eksciis, ke li konatiĝis kun malbonaj knaboj, fumadis, envolviĝis en grupa batado kaj rabis monon kaj objektojn de lernantoj de malaltaj klasoj. Lia patrino havis nenian rimedon kontraŭ li. Mi kaj lia patrino interkonsiliĝis kaj decidis, ke en la hejmo ŝi superrigardu lian lernadon kaj ne lasu lin kontaktiĝi kun tiuj knaboj; en la lernejo mi atentu lian agadon, admonu lin lerni de disciplinaj kaj elstaraj lernantoj kaj lernigu al li la forluditajn lecionojn. Poste li rimarkinde progresis en sia lernado kaj volonte helpis aliajn. Mi ĝojis pro tio.

Mi ofte korinkliniĝis al iuj lernantoj, sed neglektis necesan edukon al ili. Iam mi estis ĉefinstruistino de la dua grupo de la kvara klaso. En la grupo troviĝis knabino Su Jianrong, saĝa, bela kaj elokventa, kiu estis bona en lernado kaj kantado kaj dancado. Ŝi estis malnova grupestro kaj mia taŭga helpanto. Sed neatendite, en nova semestro ŝi estis apenaŭ reelektita kiel

grupestro. Mi miregis de tio kaj tre kompatis ŝin vidinte, ke ŝi kvazaŭ ofendiĝis, kun okuloj plenaj de larmoj. Pri tio mi faris enketon inter la lernantoj, sed ili ĉiuj silentis. Ĉe mia insista peto ili diris la veron: La instruistoj ŝatis kaj favoris ŝin kaj ŝi fariĝis fieraj kaj arogantaj, malestimis siajn kamaradojn, nebonajn en lernado, evitis fizikan laboron kaj timis malpurecon. Ĉiumatene ŝia patro veturigis ŝin al la lernejo per biciklo. Ŝiaj kunlernantoj montris malkontenton kontraŭ ŝi, ili konsiliĝis kaj decidis ne elekti ŝin kiel grupestron. Tion aŭdinte, mi kapjesis kaj opiniis min riproĉinda. Mi sciis, ke Su Jianrong estas solfilino kaj ŝiaj gepatroj amas ŝin kiel perlon en la mano. Mi interparolis kun ŝi kelkfoje, montrante ŝiajn fortaĵojn kaj malfortaĵojn. Samtempe mi diris al ŝiaj gepatroj, ke ili ne tro dorlotu ŝin.

Por bone eduki la infanojn, mi faris plejblon amikiĝi kun ili. Mi ĉiam kun granda intereso partoprenis en iliaj gimnastikado, dancado kaj ludado. Krome, mi gvidis ilin viziti fabrikojn, vilaĝojn kaj turismajn lokojn. Lastjare ni rigardis “kvin trezorojn”, lokajn produktaĵojn de Ningxia, nome Helan-inkfrotujo kun pli ol 100 gravuritaj bildoj,

MONATO

internacia magazino sendependa

Bedaŭrinde ne ekzistas multaj revuoj kia EL POPOLA ĈINIO, kiuj prezentas al vi interesajn artikolojn pri aliaj landoj. Sed ĉu vi jam konas la revuon, kiu raportas ne nur el unu sed el multaj landoj – ne pri la Esperanto-movado tie, sed pri politiko, ekonomio kaj kulturo?



En ĝi – kiel en EPCĤ – raportas indiĝenaj aŭtoroj kaj fakuloj el siaj landoj, ne eksterlandaj korespondantoj senditaj tien de hejmaj redakcioj. Jen vere unika revuo, en kiu vi povas legi ekskluzive en Esperanto verkitajn artikolojn pri ĉiuj temoj de l' hodiaŭa vivo. Apartaj rubrikoj por infanoj, junularo, turismo, kuirado, hobbio, satiro, krucenigmo, novelo ktp. Krome MONATO eldonas ĉiujare unikan poŝkalendaron, en kiu apud kalendaro kun ĉiuj naciaj festoj de l' diversaj landoj vi trovas abunde valorajn informojn tute praktikajn. Petu provekzempleron de MONATO kontraŭ du internaciaj respondkuponoj ĉe la eldonejo TK/STAFETO, Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio.

rara pelto de Ningxia-ŝafo, ĉinaj herbodrogaj licio kaj glicirizo kaj manĝebla nostoko. Dank' al tiu aktivado la infanoj ne nur akiris multajn sciojn, sed des pli amis sian hejmlokon. Sub mia gvido ili mem verkis kaj ludis la porinfanan dramon "Ningxia — Nia Kara Hejmloko". Ni ne vane klopodis. En la kvara klaso nia grupo ĉiam estis la plej avangarda en lernado kaj elektita kiel avangarda grupo de Yinchuan

por du jaroj. Mi estis elektita kiel eminenta instruistino de la urbo kaj bona junpionira gvidanto.

Mi estas 42-jara patrino de kvin infanoj. Mia edzo laboras kiel vicdirektoro de iu konstrua kompanio. Li ĉiam estis okupita. Ni jam travivis la plej malfacilan tempon. Nia plej juna filino lernas en la sesa klaso de elementa lernejo. La infanoj

prenis sur sin la hejmlaborojn. Pro okupiteco ni malofte restis hejme por ĝui familian feliĉon kune kun ili. Plenkreskinte iom post iom, ili komprenis nin, tamen ili ja bezonas patrinan amon. Foje mia plej juna filino, kun mia kolo en siaj brakoj, envie diris: "Panjo, vi amas viajn lernantojn pli ol nin." Mi sentis min riproĉita de konscienco, sed neniam volas forlasi mian "ĝardenistan" devon.

Prospero kaj kadukiĝo de Tang-dinastio

de BA HONG

IMPERIESTRINO WU ZETIAN

Wu Zetian (624—705 p.K.) estis la sola imperiestrino en la historio de Ĉinio. Ŝi komence estis unu el la kromedzinoj, la plej favorata, de la imperiestro Taizong (Li Shimin).

Wu Zetian estis tre bela, tamen brava. Iufoje la imperiestro kun siaj kromedzinoj rigardis koleman ĉevalon kaj demandis: “Kiu povas obeigi ĝin?” Wu respondis: “Mi povas, kondiĉe, ke mi havas tri objektojn, nome feran vipon, feran martelon kaj ponardon. Se ĝi ne obeos, mi ĝin vipos. Se ĝi rezistos, mi martelos ĝin sur la kapon. Se ĝi ree obstinos, mi ponardos ĝian gorgon!” La imperiestro admiris ŝian kuraĝon.

Post la morto de Taizong, la 26-jara Wu Zetian bonziniĝis laŭ la palacaj reguloj de Tang-dinastio.

La kronprinco Li Zhi ekamis Wu Zetian jam antaŭ la morto de sia patro. Imperiestriĝinte, li venigis ŝin en la palacon kaj prenis ŝin kiel sian kromedzinon. Post nelonge, Wu Zetian realigis sian intrigan planon, ke la imperiestro Gaozong (Li Zhi) nuligis la titolon de sia originala edzino kaj prenis Wu Zetian kiel sian oficialan edzinon. Gaozong estis senkapabla, tiel ke baldaŭ la kortega potenco falis en la manon de Wu Zetian.

Post la morto de Gaozong, Wu Zetian eliminis korteganojn politike malfavorajn al ŝi kaj mem surtroniĝis je sia 61-jara aĝo en 690 p.K. Ŝi titolis sian ŝtaton Zhou.

Kvankam Wu forpremis kaj eĉ mortigis siajn politikajn oponantojn, ŝi tamen bone uzis talentulojn kaj ofte bedaŭris, ke ili ne havas terenon disvolvi sian talenton. Kiel imperiestro, ŝi estis promesplena kaj kapabla en la regado. Ŝi ne ofendiĝis pro la raportoj ŝin skandalantaj. Ŝi dediĉis grandan atenton al la loka administrado. Ŝi premiis tiujn ŝtatajn oficistojn, sub kies estroco la agro plivastiĝis kaj la kamparanoj havis superfluan grenon, kaj punis tiujn, sub kies administrado malpliĝis la loĝantaro. Dum ŝia regado multe disvolviĝis la ekonomio kaj kulturo de la tuta lando; la nombro de loĝan-

taj familioj en la tuta lando kreskis de 3 800 000 en la reg-periodo de Taizong al 6 150 000; ankaŭ la diversaj naciecoj kunvivis harmonie.

En 705 p.K. Wu Zetian malsaniĝis grave. Profitante tiun ŝancon iuj korteganoj faris palacan puĉon kaj surtroniĝis ŝian filon Li Xian. Oni restaŭris la titolon de Tang-dinastio. Post nelonge Wu Zetian mortis de malsano.

DIBOĈEMA IMPERiestro XUANZONG

Dum la regado de imperiestro Zhongzong (Li Xian), la kortego estis en ĥaoso. Post pluraj tumultoj, Li Longji imperiestriĝis. Li estis imperiestro Xuanzong.

Post sia surtroniĝo, la pli-ol-20-jara Xuanzong ĉiamaniere

Ĉinstila pentraĵo «Imperiestrino Wu Zetian kaj Ŝia Gvardio»



strebis por restarigi la aferon de Taizong. Li reordigis la kortegon kaj nomumis eminentulojn alt-ranguloj. Dank' al tio la malordigita situacio ŝanĝiĝis kaj Tang-imperio reprosperiĝis.

Post pli-ol-20-jara paca regado, Xuanzong iom post iom fariĝis fiera, maldiligenta kaj diboĉema. Li nomumis ĉefministro sentaŭgulon Li Linfu kun afabla mieno sed koro vipura. Tiu lasta forpuŝis honestajn talentulojn el la kortego kaj promociis flatemulojn. Pro tio kadukiĝis Tang-dinastio.

En la lastaj jaroj de sia regado Xuanzong dorlotis sian belegan junan kromedzinon Yang, saĝan kaj lertan en dancado kaj muziko. Li sin amuzis tagnokte en la palaco kun la belulino Yang, ne plu zorgis la ŝtatajn aferojn kaj komisiis ilin al Li Linfu. Li plenumis ĉiajn frivolajn postulojn de Yang. Iufoje Yang volis manĝi liĉion produktitan en la sudo, kaj Xuanzong ordonis, ke oni transportu, stafete per rapidaj ĉevaloj, freŝajn liĉiojn de Guangdong malproksima je kelkmil km. al la ĉefurbo Chang-an. Ankaŭ la pliaĝa frato Yang Guozhong de la belulino Yang estis sentaŭgulo, sed nomumita kiel ĉefministro. Ŝiaj tri pliaĝaj fratinoj ricevis altan rangon de la imperiestro. La tuta familio Yang vivis lukse kaj diboĉe.

RIBELO DE AN LUSHAN

En la jaro 755 p.K., kiam imperiestro Xuanzong estis sorĉita de la bela kantado kaj ĉarmaj dancoj de la belulino Yang, An Lushan, estro de loka regopotenca en la nordo de Tang-imperio, atakis la centran regionon de la imperio, komandante 150 000 militistojn. Post nelonge, la ri-



Ĉinstila pentraĵo «Insurekciaj Trupoj de Huang Chao Konkeris Chang-an»

belaj trupoj rekte marŝis al la pasejo Tongguan, proksima al la ĉefurbo. En 756 p.K. Xuanzong en akompano de belulino Yang kaj ŝia frato haste fuĝis al Sichuan-provinco. Kiam ili atingis Maweiyi (okcidente de la nuna gubernio Xingping de Shaanxi-provinco), la sekvantaj gvardioj ribelis, mortigis Yang Guozhong kaj postulis mortigi la belulinon Yang. Xuanzong devigite ordonis ŝin strangoli. Post nelonge la kronprinco Li Heng surtroniĝis. Li estis imperiestro Suzong.

La ribelo de An Lushan estis la plej granda enlanda milito en Tang-dinastio kaj turnopunkto de ĝia prospero al kadukiĝo. La tumulto daŭris ok jarojn kaj kaŭzis grandan perdon al la vivo kaj riĉaĵo de la popolo. Post la ribelo la loĝantaro malkreskis de 9 000 000 familioj al 1 900 000.

Poste Tang-dinastio restarigis sian regadon kaj subpremis la ribelon helpate de la norda naci-malplimulto Huihe. Sed, de tiam la centralizisma regado iom post iom kolapsis kaj aperis loka se-

paratismo. Dum 151 jaroj de 756 ĝis 907 p.K. 14 imperiestroj surtroniĝis sinsekve, sed neniu el ili kapablis restarigi ĝian prosperon.

PEREO DE TANG-DINASTIO

En la posta periodo de la dinastio malordo regis ĝian politikan situacion, koruptiĝo fariĝis kutimo de burokratoj, kiuj multe faris malutilojn al la popolo. Sub ekstrema dekadenco en politiko, la reganta kliko estrata de la imperiestro freneze forrabis la agron por kontentigi bezonon de sia luksa vivo. Diversaj impostoj pezas sur la kamparanoj kaj rapidigis ilian bankroton. La kamparanoj grandkvante fuĝis

Maŭzoleo Qianling, tombo de Imperiestro Gaozong kaj Imperiestrino Wu Zetian de Tang-dinastio



De Xifengkou-pasejo al la Orientaj Maŭzoleoj de Qing-dinastio

de LI PING

XIFENKOU

Xifengkou, grava pasejo ĉe la Granda Muro okcidente de Shanhaiguan, situas en la gubernio Qianxi, Hebei-provinco. Tie ĵus konstruiĝis Akvorezervejo Panjiakou.

La akvorezervejo estas ĉefa konstruo por ekspluati akvoenergiajn riĉfontojn de Luanhe-rivero kaj konduki ĝian akvon al Tianjin. Ĝi havas kapaciton de 2.93 miliardoj da kubmetroj kaj in-

fluas 70% de la baseno de Luanhe-rivero.

Kiam mi kaj fotisto Xiao Cai atingis kajon ĉe la akvorezervejo, ni renkontis vizit-grupon el la Pekina Filmstudio. Xiao Cai, tiu ĉi filmo-amanto, tuj rekonis famajn reĝisorojn, filmistojn kaj filmaktorojn en la grupo. Nian atenton altiris la ruĝvanga kaj humura studiestro Wang Yang. Li estis konata kiel legenda homo en la filmorondo.

Ni eniris en plezurŝipon. Ĝi veturis laŭ la akvobaraĵo kaj poste sin direktis al la vaste etendita akvorezervejo. Ni retrorigardis kaj vidis la baraĵon staranta inter du montoj kaj ŝirmanta pecon da ĉielo. Nia inĝeniero-akompananto diris al mi, ke la baraĵo kun longeco de 1 040 metroj, alteco de 107.5 metroj kaj konstrua kvanto de pli ol 2.6 milionoj da kubmetroj estas la tria laŭ grandeco en Ĉinio, nur

aliloken. Sub netolerebla kruela subpremado de la bienuloj, iuj kamparanoj suriris ribelan vojon.

En 875 p. K. okazis granda kamparana leviĝo sub la gvido de Huang Chao. La ribelanta armeo kun 600 000 membroj militis en plejparto de Ĉinio, kaj gajnis venkojn unu post alia super la armeo de Tang-dinastio. En 880 p. K. la armeo de Huang Chao konkeris la orientan ĉefurbon Luoyang, prenis la pasejon Tongguan kaj rekte minacis la ĉefurbon Chang-an. La imperiestro Xizong panike fuĝis al Chengdu de Sichuan-provinco. Kiam Huang Chao eniris la ĉefurbon gvidante sian armeon, la urbanoj kolektiĝis ambaŭflanke de stratoj por rigardi la ribelantojn. La sendito de Huang Chao publike anoncis al la popoloj: "Reĝo Huang leviĝis por la popolo, li ne similas la Tang-imperiestrojn kiuj ne amis vin. Vi

ĉiuj estu trankvilaj!" Li oficiale fondis kamparanan regpotencon kun la landnomo Granda Qi.

Kontentaj je siaj atingoj, la gvidantoj de la ribelantoj neglektis la forton de la restantaj malamikoj kaj ne persekutis ilin per siaj elitaj trupoj. Pro tio la centra registaro de Tang gajnis tempon manovri alilokajn armeojn por sieĝi la ribelantojn en Chang-an. La sieĝitajn ribelantojn trafis ĉiam pli multaj malfaciloj. Pro manko de greno, ili devis plenigi la stomakon per arboŝeloj k.a.

Samtempe kun tio, Tang-registaro intensigis sian persvadon al la ribelantoj kapitulaci. En tia situacio grava generalo Zhu Wen el la ribelantaj trupoj kapitulacis al la registaro. Krome, Tang-dinastio ankoraŭ venigis Li Keyong, nobelon de norda tribo Shatuo por kune ataki la ribelantojn.

Retiriĝinte el Chang-an, la ribelanta armeo suferis sinsekvajn malvenkojn kaj plejparte estis ekstermitaj. La brava gvidanto de la ribelantoj Huang Chao sin mortigis ĉe Taishan-monto de Shandong-provinco. Tiel finiĝis la senprecedenca dekjara ribelo.

Dum la ribela milito la eŭnukoj kaj lokaj generaloj ĉiamaniere ekspansiigis siajn fortojn. Post malvenko de la kamparana leviĝo, la tuta lando dronis en ĥaoso pro milito inter la lokaj generaloj. Tiam Tang-dinastio ekzistis nur nominale.

En la jaro 907 p.K. Zhu Wen eksigis la lastan imperiestron de Tang-dinastio kaj mem imperiestriĝis kun la ŝtata nomo Liang. Tiel pereis Tang-dinastio post sia 289-jara regado. La ĉina historio eniris en la separatisman periodon de Kvin Dinastioj kaj Dek Regno.

post tiuj de Gezhouba kaj Danjiangkou.

La Akvorezervejo de Panjiakou zigzagas inter altaj montoj. Ĝia akvosurfaco jen mallarĝas, jen larĝas, kvazaŭ malsamaj melodioj alternas en simfonio.

Fine prezentiĝis al niaj okuloj la Granda Muro, kiu malsupreniras en la akvon laŭ la maldekstra montodeklivo, grimpas sur la dekstran bordon kaj etendiĝas malproksimen. Ambaŭborde staras krutaj montpintoj. Ja grava strategia loko.

Tio estas Xifengkou-pasejo.

Albordiĝis nia ŝipo. Laŭ la muro ni grimpis sur la unuan turon ĉe la dekstra bordo.

La turo havas du etaĝojn. La malsupra konsistas el dekkelkaj brikaj ĉambretoj, kiuj povis loĝigi dekkelkajn soldatojn. La supra kun kreneloj servis por gardo. Tia turo ligita kun la Granda Muro estis konstruigita de la Ming-dinastia generalo Qi Jiguang en la 16-a jc. Sennombraj tiaj turoj staras sur la 600-

kilometra muro de Shanhaiguan ĝis Juyongguan.

La turo, kiun ni vizitis, restis sendifekta escepte iujn negrandajn detruojn, tra kiuj penetris sunradioj. Siblanta vento forte ŝancelis velkintajn herbojn, impresante per soleco kaj malvarmo. Imagu, kiom sopiris siajn familianojn la antikvaj garnizوناتaj soldatoj, kiuj sidis ĉirkaŭ fajro sur la izolita turo, precipe en vintraj noktoj!

La sireno urĝis nin reveni al la ŝipo. Iu reĝisoro apogita sur balustrado ekscitiĝe mangestis al Wang Yang: "Belege! Mi volas filmi eksterajn scenojn ĉi tie por mia filmo. La monto, la akvo kaj la muro spicos la rolojn per gusto de antikveco."

"Do proponu min por la rolo," ridis Wang Yang. "Mi jam eniris la senton kaj medion de la rolo."

"FESTO" DE KAMPARANOJ

La sekvantan antaŭtagmezon ni veturis al la gubernio Zunhua en baseno ĉe la suda piedo de Yanshan-montaro apud la Gran-

da Muro. La loko produktas kaŝtanojn, kratagfruktojn, pomojn kaj pirojn, kies plej alta jara produktokvanto atingis 26 milionojn da kg. La pasintan jaron oni denove havis riĉan rikolton.

La aĉetejo de la Sepa Distrikto estis tre aferoplena. Proksimaj kamparanoj transportis tien per ĉevalĉaroj korbojn kaj korbojn da kratagfruktoj. Iliaj vizaĝoj radiis de ĝojo. Anstataŭ foriri kun ricevita mono, ili gaje babilis duope aŭ triope. Infektitaj de la medio, infanoj saltis kaj kuris en homamasoj. Ĉie aŭdiĝis iliaj ridado kaj krioj.

Aŭtunaj tagoj estas "festo" de kamparanoj.

Lizhuang en la Sepa Distrikto estas malgranda kvieta montvilaĝo el pli ol cent familioj. Enirinte en ĝin, ni vidis nur kelkajn kokinojn kaj laktobovinojn sur ĝia strato. Xi Qingyou, estrarano de la produkta taĉmento, diris al ni, ke la vilaĝanoj nun rikoltas kratagfruktojn. Li invitis nin al sia hejmo kaj regalis nin per pomoj. Li estas 61-jara kaj grizhara, sed forta. Li kaj lia edzino vivas kun sia filino, liaj du edziĝintaj filoj havas sian propran familion.

Li aldonis, ke granda ŝanĝo okazis al la vivo de la vilaĝanoj. Estas ĉina popoldiro: "Kiu loĝas ĉe la monto, tiu vivas de la monto." En vilaĝo oni plantis multajn pomujojn kaj kratagojn kaj flegis ilin per scienca metodo, tiel ke ili akiris sinsekvajn riĉajn rikoltojn de fruktoj. En 1985 ĉiu vilaĝano enspezis meznombro pli ol 670 juanojn (egale al 340 usonaj dolaroj), li mem ricevis pli ol 1 300 juanojn. Riĉiĝis kamparanoj kaj plimultiĝis ankaŭ la kolektiva akumula fonduso. La produkta taĉmento intencis per la fonduso bori pli da motor-

Sun-forno en kamparana familio



SUDE KAJ NORDE DE LA GRANDA MURO



pumpaj putoj kaj planti pli da fruktarboj.

ENERGIO UTILIGATA

Nin profunde impresas la utiligo de energio en Zunhua. Kaj en la gubernia urbo kaj en la vilaĝoj, kaj en la oficejoj de produktaj taĉmentoj kaj en la hejmoj de kamparanoj, ĉie videblas metanaj basenoj kaj sunenergiaj fornoj.

En la malgranda vilaĝo Dongjigezhuang preskaŭ ĉiuj ĝiaj 42 familioj bredas zibelojn, mustelojn kaj kuniklojn. Por bredado de kunikloj estas bezonata granda kvanto da herboj. Sed la loko abundas je homoj kaj malabundas je kulturebla tero, kaj krome, ĝiaj agroj estas malfekundaj, kio kaŭzis seriozan problemon de hejtaĵoj. Dum la lastaj jaroj la vilaĝanoj konstruis 28 metanajn basenojn kaj 27 sunenergiajn fornojn, per kiuj ili ne nur solvis la hejtaĵan problemon, sed ankaŭ ŝparis herbojn por disvolvi la hejman bredadon.

Ni venis al la hejmo de 72-jara kamparano Cao Shikui. Metante akvokruĉon sur sian sunenergian fornon, li diris al ni, ke necesas nur 15 minutoj por boligo de unu kruĉo da akvo. Li studis sunenergian utiligon jam pli ol dek jarojn. En 1971 li legis artikolon pri teorio de sun-

energia forno en scienca gazeto kaj decidis mem fari tian fornon. Dum la jaroj li iris mil kilometrojn por konsulti spertulojn kaj kolekti materialojn. Fine li sukcesis. La vilaĝanoj nomas lin "maniulo de sunenergia forno".

Viŝpurigante la sunenergian fornon, li diris: "La naturo donis al ni multon profiteblan, sed ni antaŭe ne sciis utiligi ilin. Por kiom da jaroj oni ankoraŭ povas konsumi la karbon en la mondo? Sed la suna energio estos neniam elĉerpebla."

LA ORIENTAJ MAŬZOLEOJ DE QING-DINASTIO

La nomitaj maŭzoleoj sin trovas ĉe la piedo de Changrui-monto, okcidente de la gubernia urbo Zunhua. Ili estas unu el la grandiozaj kaj kompletaj tombo-konstruaĵaroj de la antikva Ĉinio, kie enteriĝis kvin imperiestroj de Qing-dinastio (1616—1911) kaj iliaj 15 edzinoj kaj multaj krom-edzinoj. La maŭzoleoj, nur 125 km. for de Pekino, jam malfermiĝis kiel turisma loko.

La unua maŭzolea konstruaĵo estas alta ŝtona portalo kun bele gravuritaj desegnaĵoj kaj kuŝaj ŝtonaj bestoj. Ĝi impone staras sur vasta kamparo. Ĉ. cento da diversaj ŝtonaj pontoj estas grava konsistiga parto de la maŭzoleoj. La pontoj havas du for-

mojn, arkan kaj platan. Sur la ŝtonaj balustradoj de la arkaj pontoj videblas gravuritaj drakoj, feniksoj kaj nuboj.

Estas originalaj la subteraj palacoj en la maŭzoleoj. El la Qing-dinastiaj imperiestroj Qianlong (1711—1799) plej longe tenis sian tronon, tial la konstruado de lia maŭzoleo daŭris plej longe, ĝia skalo estis granda kaj ĝia arto alta. La subtera palaco de lia maŭzoleo abundas je ŝtongravuraĵoj. Ĝiaj ok ŝtonaj pordoj surhavas po unu vive plastikan kaj klarkonturan reliefon de bodisatvo. Ĝiaj muroj kaj plafono estas plenaj de gravuritaj desegnoj kaj sutroj.


La imperiestra patrino Cixi (1835—1908) estis fame konata maliculino, kiu praktikis kruelan regadon dum 48 jaroj. El la Qing-dinastiaj maŭzoleoj la surtera parto de ŝia maŭzoleo havas la plej altan konstruarton. La blankmarmoraj balustradoj ĉirkaŭ la halo Long'en surhavas belajn ŝtonajn desegnojn kaj, la ŝtongravuritaj drako kaj fenikso antaŭ la halo estas vere eminenta arta verko.

La ore glazuritaj tegoloj rebri- lis en la krepuska sunlumo. Mi promenis inter la maŭzoleoj, kiuj, kvazaŭ maljunuloj, rakontis al mi la historion de Qing-dinastio.


SUDE KAJ NORDE DE LA GRANDA MURO (2)

DE XIFENKOU-PASEJO AL LA ORIENTAJ MAŬZOLEOJ DE QING-DINASTIO


Fotoj de CAI HAIFENG



Xifengkou-pasejo de la Granda Muro




Ŝtonaj incensuoj antaŭ
la tombo de la im-
periestro Qianlong



La Orientaj Maŭzoleoj en vesperkrepusko


Riĉa rikolto de kratagfruktoj





La Granda Muro sub la vespera suno

Kampoj apud la Granda Muro




NORDA ÇINIO

EN



Velsledado


En frosto




VINTRO

(Bv. legi la artikolon "La Neĝe Ves-
ita Norda Ĉinio" en tiu ĉi numero)

Fotoj de LAO BAI



Gaja vintra tago!



Ĉarmaj glaciaj lampoj

Veturo per sledo



